

# LITOVA STELO

4

(146)

2002

LIETUVOS ŽVAIGŽDĖ



**En la kajero:**

★

Steloj de litova  
literaturo (3)

★

Litovaj naciaj  
vestoj

★

Litovlingva teksto  
skribita antaŭ  
2000 jaroj

★

Kostoj de  
multlingveco

★

BET-38

★

**Paro en naciaj vestoj.**

(Pri la vestoj legu  
sur paĝo 11 kaj  
rigardu la lastan  
kovrilpaĝon)



# LITOVA STELO

Revuo de Litova Esperanto-Asocio

Redakcio kaj administracio:

Kaunas, Zamenhofo 5

Adreso por korespondado:

P.k. 167, LT-3000 KAUNAS, Litovio

Telefonoj: redakcio (370-37) 209 083

administracio (370-37) 208 503

Fakso: (370-37) 228 616

E-poŝto: litovastelo@takas.lt

*Redaktoro*

**Petras ĈELIAUSKAS**

*Redakcia Konsilio*

**Antanas GRINCEVIČIUS**

**Povilas JEGOROVAS**

**Aida ČIŽIKAITĖ**

**Jevgenij GAUS**

## ABONKONDIĈOJ

### POR 2002

Abonprezroj por 2002 estas indikitaj sur la 3a kovrilpaĝo.

**Abonantoj el Litovio** sendu 20 lidojn perpoŝte al sekretario *Aida Čižikaitė*, ab.d. 167, 3000 KAUNAS, aŭ abonu persone en sidejo de LitEA.

**Alilandaj abonantoj** kontaktu perantojn. Se en via lando peranto ne estas, uzu Libroservon de UEA. Se vi ĝiros la monon rekte al konto *litv-s* ĉe UEA, *Nieuve Binnenweg 176, 3015 Rotterdam, Nederlando*, vi mem devas informi nin pri tio kaj sendi vian adreson.

Oni rajtas sendi monon al Litovio el: *Armenio, Aŭstrio, Azerbajĝano, Belgio, Belorusio, Ĉeĥio, Danio, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Kartvelio, Kirgizio, Latvio, Moldavio, Rusio, Slovakio, Svislando, Ukrainio, Usono*. Poŝtmandaton adresu: **Litova Esperanto-Asocio, p.d. 167 LT-3000 KAUNAS, Lithuania**. En Litovio ni ricevos la sumon kalkulitan en lidoj laŭ la kurzo.

## **IV periodo XII jaro. N-ro 4 (146)**

**Julio – aŭgusto 2002**


### **ENHAVO**

<i>P.Ĉeliauskas</i> : Steloj de litova literaturo (3) .....	1
<i>J.Biliūnas</i> : Lumilo de feliĉo .....	5
<i>A.Čižikaitė</i> : Rigardo al literaturo de najbaroj ....	8
<i>A.Peĉelis</i> : Litovaj naciaj vestoj .....	11
<i>A.Grincevičius</i> : Mozaiko de Litovia vivo .....	14
<i>A.Ziabkus</i> : Litovlingva teksto skribita antaŭ 2000 jaroj .....	16
<i>P.Ĉeliauskas</i> : Egiptaj dioj en litova tero .....	19
<i>C.Piron</i> : Kostoj de multlingveco .....	20
La revuo “Merkato” .....	22
Monda universitato .....	22
<i>A.Peĉelis</i> : BET-38 en Rigo .....	23
<i>H.Alos i Font</i> : Ferioj en Baltiaj landoj .....	24
Antanas Statkevičius (nekrologo) .....	26
En la mondo Esperanta .....	27
Ŝanĝo de telefonaj kodoj kaj numeroj .....	30
Filozofiaj anekdotoj .....	31
Vortenigmo. Vortludoj .....	32

Materialo de nia revuo povas esti represita aŭ tradukita kun nepra indiko de la fonto - Litova Stelo.

## STELOJ DE LITOVA LITERATURO (3)

Pli koncize mi mencios ankaŭ plej elstarajn prozistojn kaj dramistojn.



Ĵemajta episkopo *Motiejus Valančius* (Mote'jus Valan'čius, 1801-1875) por klerigaj celoj verkis instruajn rakontojn: "Porinfana libreto", "Libreto por plenkreskuloj", "Juzè el Palanga" k.a. Ili eldoniĝis dum tiu nigra periodo, kiam litova lingvo kaj libropresado estis malpermesitaj. Do M. Valančius estis batalanto kontraŭ tiu subpremo, organizanto de libropresado en eksterlando. Sukcesis ankaŭ lia kampanjo kontraŭ drinkado: ĉiuj drinkejoj estis fermitaj, ĉar influo de eklezio tiutempe estis grandega. Bedaŭrinde tiu periodo de sobroco ne longe daŭris. Pli detale pri la verkisto (ankaŭ lian verketon) vi povis legi en LS (2001, n-ro 2).



Interesa fenomeno en litova literaturo estis *Žemaitė* (Ĵemaj'te, vera nomo Ju'lija Žy'mantienė, 1845-1921). Ŝi estis simpla kamparanino, sed instigita de klerulo Po'vilas Višins'kis, estante jam 50-jara, ŝi komencis verkadi rakontojn kaj en ili pentris elĉerpan bildon de tiutempa vivo en litova vilaĝo. Nun ŝiaj rakontoj kaj dramverkoj estas klasikaĵoj de litova literaturo. Kun la verkistino kaj ŝia verkado Litova Stelo konigis siajn legantojn en 1995 (n-ro 3).

Elstara litova beletristo estis *Jonas Biliūnas* (Jo'nas Bilu'nas, 1879-1907). Li estis majstro de mallonga lirike psikologia novelo. Lia demokratia mondkoncepto klare vidiĝas en rakonto "Malgaja fabelo", kie li pri-skribas ribelon en 1863 kaj ĝian subpremon. Per patoso kaj optimismo estas signita lia alegoria rakonto "Lumilo de feliĉo" (ni represas ĝin en ĉi tiu numero). Mortis li en aĝo nur de 28 jaroj.

Granda litova prozisto, publicisto, literatura historiisto kaj kritikisto estis *Vaižgantas* (Vaij'gantas, vera nomo Juo'zas Tu'mas, 1869-1933), en siaj verkoj tre kolore pentrinta socian vivon de tiutempa Litovio, montrinta karakterajn trajtojn de homa psikologio, rekreinta riĉan ĉiutagan kolorecon de la lando. Menciindas lia ĉefverko "Sereniĝoj", kies temo estas nacia movado kaj batalo de litovoj por ekonomia kaj kultura firmiĝo dum periodo 1890-1905. Alia populara verko estas "Onkloj kaj onklinoj", kie kun granda artismo estas pentrita ĉiutaga vilaĝa vivo kaj poezia individueco de homo. Kun

rakonto de Vaižgantas legantoj povis konatiĝi en 1994 (n-ro 5).



Precipe gravan lokon en litova literaturo okupas *Vincas Krėvė* (Vin'cas Kreve', vera familinomo Mickevičius, 1882-1954). Lia talento, erudicio, personeco ravis homojn, li dum du jardekoj estis formanto de literatura klimato en Litovio. La plej grandan parton de lia verkaro konsistigas verkoj, ligitaj kun pasinteco de Litovio. En unuj ili apogas sin sur folkloro, aliaj – sur historiaj situacioj kaj personoj. V. Krėvė direktis sian atenton al tri historiaj periodoj: bataloj de litovoj kontraŭ krucistoj, unuiĝo de disiginta Litovio kaj defendo de ŝtata suvereneco. Heroecan eposon similas “Legendoj de maljunaj homoj el Dainava-lando”. Tamen patriotismaj ideoj kaj glorado de herooj ne elĉerpas la valoron, kiu sin kaŝas en vortmuziko, en magio de apartaj bildoj kaj eldiroj. Ŝajnas, la “Legendoj...” estas verkitaj por kanti recitative. Unu legendon “Tombejo de herooj” eblas legi en Litova

Stelo (1992, n-ro 5).

La plej granda dramverko de V. Krėvė estas “Šarūnas” (Ŝaru'nas), kie la aŭtoro penetras periodon, kiam Litovion ruinigis intergentaj bataloj. Ekvidinte rabajn celojn de krucistoj, la duko Šarūnas (personeco ne historia) komencas unuiĝi litovojn. Alia historia dramo estas “Skirgaila” (Skirgaj'la). Li estis frato de Jogaila (poste pola reĝo Jagelo) kaj plenumis lian politikon. Aliaj dramverkoj de V. Krėvė estas “Morto de Mindaugas”, “Bofilo”. En novelaro “Sub pajla tegmento” regas trankvila fluo de ĉiutaga vivo, plena de elegia humoro, travidebla lirikismo kaj gracia humoro. Novelo “Ĉe la pordego de la ĉielo” estis publikigita en Litova Stelo (1995, n-roj 5 kaj 6).

En 1940 V. Krėvė pro sia progresemo estis invitita al t.n. “popola registaro” kaj okupis postenojn de ĉefministro kaj ministro pri eksterlandaj aferoj. Ekvidinte, ke la okupantoj preparas anekson de Litovio, li veturis al Moskvo kaj provis konvinki Molotov-on ne detrui litovan ŝtaton, sed kompreneble ne sukcesis. Ne dezirante esti enteriganto de litova sendependeco, li ekŝiĝis el la registaro, dum la milito ne evakuiĝis al Rusio, sed faris publikan deklaron pri tragikaj eventoj de la jaro 1940. Kiam en 1944 la ruĝa armeo reokupis Litovion, V. Krėvė elmigris kaj ekloĝis en Usono. Tie li komencis grandan verkon “Filoj de la ĉielo kaj tero”, en kiu li provis ĉiuflanke priskribi aperon de kristanismo, pentri panoramon de hebrea vivo dum tempo de Kristo. Bedaŭrinde la tria parto de la verko restis ne finita.

Temaro de *Antanas Vienuolis* (Anta'nas Vjenū'lis, vera familinomo Žukauskas, 1882-1957) estas vasta. Li bildece priskribis psikologion de vilaĝanoj kaj intelektuloj, historian pasintecon kaj vivon de aliaj landoj. Liaj plej valoraj verkoj estis kreitaj antaŭ la Dua Mondmilito: “Kaŭkazaj legendoj”, “La droniĝintino”, romanoj “Antaŭ tago”, “Kancero”, “Hospitala ĉambro de intelektuloj”, “Vojkruciĝoj”, dramverko “En krepusko”. Kaŭkazaj legendoj “Eterna violonisto” kaj “Damnitaj monaĥoj” estis publikigitaj en



Litova Stelo (1992, n-ro 1 kaj 1995, n-ro 3).

Dum soveta tempo verkita romano "Bieno de Puodžiūnas" estis tre laŭdata, ĉar ĝi priskribis riĉulon-ekspluatiston. Nuntempe oni jam scias, ke laŭ postuloj de redaktoro, kiu ludis rolon de cenzuristo, A. Vienuolis kelkfoje devis reverki la romanon kaj ĝi estis tiom difektita, ke la aŭtoro jam ne emis agnoski ĝin sia verko. Simila sorto trafis multajn tiutempajn kreaĵojn.



Mencion indas *Balys Sruoga* (Balis' Srūo'ga, 1896-1947), homo de komplika biografio, de multflanka talento, serĉanto de novaj vojoj en literaturo. Li estis ankaŭ poeto. En dramverko "La ombro de la giganto" B. Sruoga priskribis batalon de polaj magnatoj kontraŭ litova grandduko Vytautas (Vi'taŭtas). Dramo "Terura nokto" estas dediĉita al revolucio en 1905-1907. En "Antaŭmatena destino" estas priskribita ribelo de servutuloj, en "Kazimieras Sapiega" – ruiniĝo de komuna litova-pola ŝtato. Dum Hitlera okupacio la verkisto estis arestita kaj sendita al koncentrejo apud Stuthof. Memoraĵoj pri tiu surtera infero estas priskribitaj en libro "Arbaro de dioj". La libro estis esperantigita, sed ne eldonita kaj perdiĝis. Fragmentojn

de tiu libro vi povas legi en Litova Stelo (1993, n-ro 3 kaj 1996, n-ro 1).

Abundis verkistoj ankaŭ dum postmilita soveta periodo, kiu tamen ne estis favora al libera kreado. Nur kelkaj el ili sukcesis krei valorajn verkojn. Pli facile estis skribi pri pasinteco, kaj en verkoj pri nuntempo ne eblis diri la veron: principo de socialisma realismo postulis prezenti la vivon ne tia, kia ĝi reale ekzistis, sed tia, kia ĝi devus aspekti laŭ marksisma vidpunkto. Ekzemple, perforta pelado de kamparanoj al kolhozoj devis esti pentrata kiel ĝoja kaj libervola pro kompreno de "avantaĝoj de komuna laboro". Estis rimarkinde jam tio, se iu aŭtoro kapablis diri almenaŭ kvaronveron, sed hodiaŭ tiaj verkoj jam ne ŝajnas al ni sufiĉaj.




Estas ankoraŭ unu prozistino, kiun oni komparas kun Žemaitė. Ŝia nomo estas *Ieva Simonaitytė* (Jeva' Simonajti'te, 1897-1978). Ŝia talento same elŝprucis el fonto de popola vivo. En litovan literaturon ŝi eniris kun la problemoj, herooj kaj dialekto de sia naskiĝregiono – de Litovio Minora, kiu tiutempe apartenis al kajzera Germanio. Ŝi lernis aŭtodidakte kaj verkadi komencis impresita de la Unua Mondmilito. Post la milito I.Simonaitytė finis kursojn de tajpado kaj stenografio. En 1935 aperis ŝia romano "La sorto de Ŝimonisoj", baldaŭ ricevinta literaturan premion de Litovio. La romano per

vivobildoj de unu familio prezentas historion de tuta gento dum du jarcentoj (18a-19a), kiam loĝantoj de Litovio Minora kunpuŝiĝis kun germanigo. La sorto de la familio estas tragika, ĉar nova generacio subiĝas al fremda influo kaj denaciigas. Unu ĉapitro "Pesto" de tiu romano estis publikigita en LS (1997, n-ro 1).

Kiam Hitler en 1939 aneksis Klajpedan regionon, I.Simonaitytė ne povis reveni el eksterlando, ĉar ŝia verkado estis taksata kontraŭgermana. Ŝi ekloĝis en Kaunas. Ŝi verkis ankoraŭ kelkajn gravajn verkojn – romanojn "En printempa tempesto", "Vilius Karalius", "Sen patro", aŭtobiografian trilogion "...kaj estis tiel", "Ne tiu subtegmento", "Nefinita libro".

Dramisto *Juozas Gruŝas* (Juo'zas Gru'ŝas, 1901-1986) verkis ĉ. 20 dramverkojn, multaj el ili pri historiaj temoj ("Herkus Mantas", "Zigmantas Sierakauskas", "Barbora Radvilaite", "Ŝvitrigaila"). Kelkaj tiuj verkoj estis surscenenigitaj kaj subtenis nacian konscion de la popolo.



*Jonas Avyžius*

*Jonas Avyžius* (Jo'nas Avi'jus, 1901- ) priskribis vivon de litova vilaĝo dum postmilita periodo. Lia romano "Vilaĝo en vojkruciĝo" pentras vivon de kolhozianoj, iam la romano ŝajnis al ni sufiĉe kuraĝa. Al la sama temo apartenas ankaŭ alia granda verko "Kiam senhomiĝis la bienoj" (fragmento de tiu romano estis publikigita en Litova Stelo, 1997, n-ro 6).

Interesajn verkojn kreis *Vytautas Petkevičius* (Vi'taŭtas Petke'vičius, nask.1930), kiu ankaŭ kapablis diri kuraĝajn verkojn malgraŭ severa cenzuro. Lia lasta, plej emocia verko eldonita en 1986, estas romano "La lasta epoko de pentofaro", kie la aŭtoro prezentas vastan historian panoramon de Litovio. Nun oni atendas la duan parton de la romano, kie devus estis priskribita la nuntempo.

En Litovio estas konataj ankaŭ aliaj nomoj de pli aĝaj aŭ junaj verkistoj: Mykolas Sluckis, Romualdas Lankauskas, Juozas Aputis, du fratoj Povilas kaj Petras Dirgėla, Vytautas Bubnys, Vytautas Sirijos Gira, Jonas Mikeliniskas, Kazys Saja kaj multaj aliaj. Kelkajn pliajn vortojn oni devas diri pri Romualdas Granauskas, kies rakonto "La vivo sub acero" aperis en 1988 kaj ŝokis dirinte malĝojan veron pri nuntempa vilaĝo.

Dum lastaj dek jaroj post la liberiĝo eldoniĝis verkoj, kies aŭtoroj loĝis kaj kreadis en emigracio, kaj pri kiuj ni nenion sciis. Samtempe eldoniĝis memoraĵoj de personoj, travivintaj inferon de koncentrejoj kaj ekzilon. La plej kortuŝa rakonto "Litovoj ĉe Lapteva Maro" aperis ankaŭ en Litova Stelo (1993, n-ro 3).

(Fino)

*Petras ČELIAUSKAS*

Jonas BILIŪNAS (1879-1907)

## LUMILO DE FELIĈO

(Fabelo)

Sur alta kruta monto aperis mirinda lumilo. Ĝi brilis kiel stelo ĉirkaŭita per hela rondo el oraj literoj. Ĝin ekvidinte homoj iris al la monto, miris je lumilo, sed, nepovante surgrimpi la monton, ili ne povis ankaŭ traigi la orajn literojn.

Fine troviĝis junulo, kiu tralegis al la homamaso: "Feliĉo de la homoj".

Famo pri tio disvastiĝis en la tuta ĉirkaŭaĵo: ĉie nur pri tio oni parolis. Sed neniu povis bone kompreni kaj al aliaj klarigi, kion signifas tiuj vortoj. Dum tutaj tagoj kaj noktoj homamasoj deĵoris apud la monto, unuj forirante, aliaj alvenante, kaj atendis novan, ankoraŭ pli grandan miraklon, aŭ klarigon de la malnova...

Kaj la lumilo ne nur ne estingiĝis, sed lumis ĉiam pli, kaj la oraj literoj brilis ĉiam pli klare...

Kaj unu nokton venis al tiuj homoj griza maljunulo, kaj demandis ilin:

– Por kio vi kolektiĝis ĉi tien kaj kion vi atendas?

La amaso respondis:


– Jen, sur la monto aperis lumilo kun mirinda surskribo, kiun ni ne komprenas.

– Mi al vi klarigos, – respondis la maljunulo: – tiu ĉi lumilo estas ja via feliĉo; tiu, kiu surgrimpos la monton kaj ektaŝos la lumilon, li ĉiujn homojn faros feliĉaj...

Ekĝojis la amaso kaj

ekmoviĝis kiel maro. Kvankam la monto estis alta kaj kruta, tamen pleneĝaj de ĝojo homaj okuloj rigardis ĝian pinton, kiel sunon, kaj multaj jam sin preparis por grimpi.

– Haltu, mi ankoraŭ ne finis! Ne estas tiel facile, kiel vi opinias, atingi la pinton de la monto; tiujn, kiuj grimpos, de ĉiuj flankoj timigos abomenegaj fantomoj, krios kaj hurlos per diversaj voĉoj, vokos ilin returnen. Kaj tiuj, kiuj ektimos, sin returninte ekrigardos malsupren, aŭ pro nesingardemo deglitos iliaj piedoj, tiuj momente transformiĝos je ŝtonoj. Kaj eĉ tiuj, kiuj poste surgrimpos la monton kaj ektaŝos la mirindan lumilon,



ankaŭ ili transformiĝos je ŝtonoj kaj nur per sia morto ili feliĉigos la aliajn...

Tion dirinte la maljunulo malaperis.

Ekmalĝojis la amaso aŭdinte tiujn liajn vortojn; suspiris la tuta amaso kiel unu homo kaj mallevis siajn kapojn. En iliaj okuloj estis jam ne ĝojo, sed disreviĝo; nun ili ne proksimiĝis al la monto, sed komencis eviti ĝin. Neniu volis oferi sian vivon. Kaj ne nur sian vivon ne volis oferi, sed ankaŭ aliajn de tio admonadis. Gepatroj bedaŭris siajn infanojn, junulinoj siajn fraŭlojn, junuloj siajn amatojn, fratinoj fratojn: unuj gardis la aliajn, tremis unu pri la alia.

Tamen troviĝis kuraĝuloj. Ne multaj ili estis, sed ilia nombro ĉiam kreskis.

Familioj kaŝe de ĉiuj forkuradis el gepatraj domoj, tre malofte benataj de ili; geamantoj disiĝadis, unuj riproĉante la aliajn, kaj nur malofte iuj iris kun forte kunplektitaj manoj... Kaj iris ĉi tiuj kuraĝuloj al la monto por oferi sian vivon por feliĉo de la homoj, abnegaciantes sin mem, siajn amatojn...

Malfacila estis ilia vojo. La monto estis tiel kruta kaj glita, ke sufiĉis plej eta nesingardemo – kaj la malfeliĉuloj glitis malsupren kaj ŝtoniĝis. Kaj diversaj fantomoj, kvazaŭ inferaj spiritoj flugadis ĉirkaŭe, kiel teruraj neekzistantaj bestoj timigadis de ĉiuj flankoj, hurlis kiel lupoj, siblis kiel serpentoj, bojis kiel hundoj. Pro diversaj voĉoj kaj terurajoj turniĝis la kapoj, suferis la korpoj, kaj malfortiĝinte ili faladis malsupren kaj ŝtoniĝis.

Sed anstataŭante la pereintojn iris novaj amasoj da kuraĝuloj kaj grimpis sur la monton. La montpiedon ĉirkaŭis alta ŝtona muro – tio ja estis kadavroj de la pereintoj.

La loĝantaro nun evitadis tiun monton, kiel la plej teruran malsanon kaj peston. Kaj tiuj, kiuj perdis tie karajn homojn – gepatroj la infanojn, junulinoj la fraŭlojn, junuloj la amatojn, tiuj, forŝirante la harojn de siaj kapoj kaj verŝante la larmojn, malbenis la lumigilon... La monto fariĝis la plej terura loko de malfeliĉoj kaj malbenoj.

Tamen tio ne detenis novajn amasojn de kuraĝaj sinoferintoj. La spiritoj de la pereintaj kamaradoj naskis en iliaj koroj mirindan eblecon, ili ne hezitante iris al la monto unu post la alia.

El ŝtoniĝintaj homaj korpoj ĉirkaŭ la malnova monto fariĝis alia monto, kies pinto ĉiam pli proksimiĝis al la lumilo. Al sekvantaj amasoj da kuraĝuloj estis ĉiam pli facile grimpi supren...

Kvankam pasis jam pli ol unu jaro da sinoferoj, tamen ankoraŭ neniu el la suprengrimpantoj alproksimiĝis al la montopinto, neniu ektuŝis la mirindan lumilon. Loĝantaro de la ĉirkaŭaĵo nomis ilin jen revuloj kaj frenezuloj, jen ploris ilin bedaŭrante; ankoraŭ pli multaj estis tiuj, kiuj ne nur ridis kaj mokis, sed ĝojis, ke ili pereas.

Sed jen, unu belan printempan tagon sennombra amaso da kuraĝuloj – gejunuloj, infanoj kaj maturaj viroj, palaj kaj lacaj – denove alproksimiĝis al la monto. En iliaj okuloj lumis espero kaj kuraĝo, amo kaj sindediĉo. Ekkriegis ĉiuj per potenca voĉo kaj, kiel ondoj de ekmoviĝinta maro, sin ĵetis al la monto; de ĉiuj flankoj timigataj kaj persekutataj de fantomoj ili grimpis kaj grimpis sur la ŝtonaro supren, kovrante sian vojon per novaj kadavroj de ŝtoniĝintaj kamaradoj. Ju pli supren ili grimpadis, des pli maldensa iĝis ilia nombro. Jen jam restis nur grupeto da ili. Sed ili jam tre tre proksime estis ĉe la pinto. Aŭdis ili jam nek kriegon de fantomoj, nek vidis iliajn terurajn vizaĝojn; iliaj bril-

antaj okuloj estis streĉitaj al la lumilo kaj ili jam ne povis detiri la rigardon de ĝi; tio ja estis fino de ilia malfacila vojo, tie ja feliĉo de ĉiuj homoj staris antaŭ iliaj okuloj...

Ankoraŭ du tri falis kaj la restintaj atingis la pinton... Ekkriis ili per ĝojega potenca voĉo de la venko kaj ĉiuj kiel unu ekkaptis per siaj manoj la lumilon. Kaj ĉiuj tuj transformiĝis je ŝtonoj...

Kaj okazis miraklo! Ĉiuj fantomoj malaperis, kaj la ektuŝita lumilo dispeciĝis je sennombra multego da lumiletoj, kiuj kiel falantaj steloj de la ĉielo deĝis de la monto malsupren prilumante la tutan ĉirkaŭaĵon. La homoj subite eksentis agrablan lumon en siaj kampoj, domoj kaj loĝejoj, en siaj koroj kaj kapoj – neeldireblan kvieton. Momente dispeciĝis katenoj de mallibereco, malaperis inter homoj malamo, diversaj ofendoj kaj maljusteco; ĉiuj eksentis sin egalaj kaj feliĉaj, ĉiuj estimis la proksimulon kaj liajn rajtojn.

Aperis feliĉo inter la homoj...

Ekvidinte sin kaj la aliajn tiel aliĝintajn, la homoj divenis ankaŭ la kaŭzon de la ŝanĝo. Rememoris ili la mirindan lumilon, kaj ĉiuj, kiel unu, kuris al la malbenita monto por rigardi. Sed kolektiĝintaj homamasoj jam ne trovis la lumilon. Eĉ la malnova monto jam ne estis videbla: de la malsupro ĝis la pinto ĝin kovris ŝtonoj.

Nun ĉion komprenis la homoj kaj kun respekto humile terenklinis sian kapojn; tio ja estis korpoj de iliaj savintoj, kiuj mortinte mem alportis feliĉon al ili...

Kaj de tiu tago la antaŭe malbenita monto estis nomita loko de gloro kaj feliĉo; de tiu tago ĝi fariĝis historia monumento de homa vivo. Ekde nun la loĝantaro ne nur ne kuris for de ĝi, kiel de malsano kaj pesto, sed kun respekto kaj amo humile terenklinis siajn kapojn, rememorante la pereintajn savintojn de la lando.



*Tradukis Vaclovas BARTUSEVIČIUS*

## RIGARDO AL LITERATURO DE NAJBAROJ

### Literaturo de ĉebaltaj popoloj

De pratempe ĉe bordoj de Balta Maro apogiĝas tri popoloj – litovoj, latvoj kaj estonoj. Litovoj kaj latvoj – baltoj, iliaj lingvoj estas parencaj. En la mondo nun vivas nur du baltaj popoloj, ĉar prusojn en 13a-18a jarcentoj asimilis germanoj. Nordaj najbaroj estonoj apartenas al familio de finnougraj popoloj. Ilia lingvo, proksima al la finna, multe diferencas de la baltaj. Diferencas folkloro, precipe kantoj, ekzistas multaj diferencoj de malnova mitologio kaj paganaj religioj. Tamen historio marŝis same, kaj la sorto plu kunligis latvojn kun estonojn. Agresoj de ordeno de Glavistoj (13a jc.), finfine anekso de latvaj kaj estonaj teroj al tiuj popoloj malhelpis krei propran ŝtaton. Litovio tiutempe estis forta duklando, poste kreis union kun Pollando. Estonoj kaj latvoj, apartenante al diversaj kulturoj (finna kaj balta), preskaŭ sep jarcentojn estis sub influo de germana kulturo.

Ĉiujn tri popolojn ligas kristanismo, kiun, devigataj de aneksistoj, latvoj kaj estonoj akceptis pli frue. Litovio baptiĝis multe pli malfrue. En 16a jc. tra Eŭropo ruliĝis ondo de reformacio, kiu pli forte influis latvojn kaj estonojn kaj pli malforte litovojn. Tio signifas, ke latvoj, estonoj kaj litovoj evoluigis malsamajn formojn, kiuj diversmaniere influis eklezian kaj laikan kulturojn, do, ankaŭ literaturon. Reformacio stimulis aperon de unuaj libroj en estona, latva kaj litova lingvoj. La unua latva kaj estona libroj – luteranaj katekismoj – aperis en 1585, litova "Katekismo" de M.Mažvydas – en 1547. En 1585 en Vilno estis eldonita la unua latva katolika katekismo. La 16a jarcento estas komenco de presitaj libroj por multaj popoloj (orientaj slavoj, armenoj k.t.p.). Ĉebaltaj popoloj bele enŝoviĝas en tiun ĉi aron. (Ĝis 16a jc. skriba lingvo de ĉebaltaj popoloj estis fremda – latina, germana, slava.) Ege gravan rolon por propra kaj najbaraj popoloj havis Vilna universitato (fondita en 1579), poste Tartua universitato en Estonio.

Plejfrue formiĝis religia literaturo: libroj de predikoj, originalaj kaj tradukitaj tekstoj de preĝoj kaj preĝkantoj. En vilaĝoj kaj urboj simplaj homoj uzis denaskajn lingvojn.

Ege grava por kulturoj de ĉebaltaj landoj, samkiel por tuta Eŭropo, estis la 18a jc. Al lernejoj kaj literaturaj medioj venis ideoj de Kleriga epoko. Germanaj klerigantoj kaj folkloristoj komencis kolektadi kaj publikigi latvajjn, litovajn kaj estonajn popolokantojn, ekzemplojn de parola lingvo, frazeologismojn k.t.p. Grava evento estis traduko de Biblio: en la latvan – 17a jc., en la estonan – 17a-18a jc., en la litovan – 16a jc. En latva kaj estona teroj disvastigantoj de religio (kaj ofte ankaŭ de kulturo) estis luteranaj pastroj.

En 18a jc. ĉiuj tri popoloj trafis al carisma Rusio: kelkaj partoj de Latvio jam komence de la jarcento, Estonio post kontrakto de 1721, Litovio – post lasta disdivido de Litova-Pola ŝtato (en 1795). En Rusa imperio ili estis pli longe ol cent jarojn.

La 19a jarcento, ofte nomata kiel "printempo de popoloj", ne preteriris ankaŭ Baltan marbordon. Agado de sekretaj studentaj organizoj en Vilna universitato, verkoj de A.Mickevičius pri litovaj temoj, historiaj verkoj de S.Daukantas, aro da "klerigitaj jemaĵoj" kaj poste patriotisma agado de A.Baranauskas – jen per kio distingigis komenco de la jarcento en Litovio. Kulturalan evoluon haltigis subpremo de ribelo en 1863 kaj

post ĝi sekvintaj reprezalioj kaj malpermesoj... Latva kaj estona popoloj tiajn skuojn ne travivis. Literatura proceso tie ne estis tiel krude interrompita kaj haltigita, ĝia evoluado estis pli glata kaj pli modera. Litova literaturo reviviĝis nur en fino de 19a jc., kiam aperis gazetoj "Aušra" kaj "Varpas". Tiutempe latvoj kaj estonoj jam havis siajn kantofestojn, teatron, perfektajn formojn de publika agado.

En komenco de 20a jc. publika kaj kultura ĉeestado de ĉiuj tri popoloj denove proksimiĝis. Komuna leviĝo antaŭ revolucio de 1905, tempestaj revoluciaj eventoj, malvenko – ĉio forte influis literaturon. Apud tradiciaj tendencoj aperis ankaŭ modernaj, ŝanĝiĝis ankaŭ karaktero de realismo.

Finfine revolucioj de la jaro 1917 kaj fino de la Unua Mondmilito donis eblecojn al litovoj refondi, al estonoj kaj latvoj – fondi siajn ŝtatojn, kiuj ekzistis ĝis 1940.

### Literaturo de orientaj slavo

En mezepoko orientaj slavo kreis ŝtaton Kievan Rusjon, kiu en 988 akceptis kristanisman en pravoslava formo (t.e. ritoj estis akceptitaj de Bizancaj hierarkoj). Ekde tiu tempo plifortiĝis ŝtataj kaj kulturaj rilatoj ne nur kun Bizanco, sed ankaŭ kun Bulgario, kiu iĝis peranto inter Rusio kaj Konstantinopolo.

En fino de 10a jc. formiĝis rusa skribmaniero, bazita sur *Cirila* alfabeto. Aperas manskribitaj libroj. Ŝtato kaj eklezio uzis slavan lingvon: en oficialaj dokumentoj, kronikoj k.t.p. (malnova slava lingvo tiutempe estis uzata en Ĉeĥio kaj en parto de rumanaj teroj, do ĝia disvastiĝo kaj uzado iom memorigas, ekzemple, latinan lingvon).

Tempo de Kieva Rusjo (9a-11a jc.), kiam nacioj ankoraŭ ne estis diversaj, estas tempo de rapida kultura plilarĝiĝo. Variagoj nomis Rusjon lando de urboj, ĉar famiĝis Kievo, Novgorod, Ĉernigov, Polock, Smolensk, Suzdalj, Vladimir... Formiĝis eklezia arkitekturo, surmura (freskoj) kaj ikona pentrado, eksonoris eklezia muziko, aperis pli kaj pli da tradukitaj kaj originalaj tekstoj de literaturo. Mongola ekspansio (13a jc.) sufiĉe haltigis glatan seninterrompan evoluadon de kulturo. Kieva Rusjo, kiu jam en 12a jc. komencis disiĝi al apartaj dukejoj, disfalis. Ekde 14a jc. komencis formiĝi tri nacioj (rusoj, belorusoj, ukrainoj). Kievo perdis staton de dominanta urbo. En 15a jc. kiam elstaris Rusio, orientaj teroj ariĝis ĉirkaŭ Moskvo.

14a jc. gravas por okcidentaj slavo, kie formiĝis nacio de belorusoj (en pratempo tie slavo asimilis baltojn), kaj alligo de orientaj teroj de nuntempa Ukrainio al Litova Granda Duklando (LGD). Laŭ Ukraina historiisto M.Gruŝevski, en fino de 14a jc. Moskvo rivalis kun Litovio pro Ukrainio. Orientaj slavo, kiuj trafis sub regadon de Litovio, evitis mongolan jugon. Ili partoprenis en komunaj militoj kontraŭ kruckavaliroj kaj havis sufiĉe da libereco – neniu subpremis ilian religion. Alia grava afero – en Litova GD oficiala lingvo de dokumentoj kaj kronikoj estis la slava, proksima al belorusaj dialektoj.

Ne malpli grava por orientaj slavo estas 16a jc. En tiu ĉi jarcento aperis unuaj presitaj libroj de orientaj slavo. Iniciatinto de presado estis Francisko Skorina, beloruso, deveninta el Polock, edukito de Eŭropaj universitatoj (I.Fiodorov kaj P.Mstislavcev la duan fojon donis komencon por libroeldonado en Moskvo 1562-1564). En la jaro 1522-1525 en Vilno li kompilis kaj eldonis "Apostolon" kaj "Malgrandan libron de vojaĝoj".

Do, en Vilno komenciĝis presado de slavaj libroj, kaj Skorina la unua komencis laboron de presisto en historiaj teroj de Litovio. "Feliĉa estas la urbo, kiu hodiaŭ povas fieri antaŭ 450 jaroj akceptinta 'doktoron de sep liberaj artoj' Franciskon Skorina kun iliaj litertiparoj kaj simplaj maŝinoj de presado <...>. Feliĉa estas la urbo, en sia subtegmento eldoninta la unuan presitan libron en Litova Granda Duklando. Kaj neniu tiel bele dankis al Vilno, kiel Francisko Skorina mem, en kolofonoj de siaj eldonoj enskribinte, ke tiuj ĉi libroj estas presitaj 'en glora kaj majesta urbo Vilno' " – skribis Justinas Marcinkevičius (fama nuntempa litova poeto).

Tamen 16a jc., donacinta la unuajn slavajn librojn, havis ankaŭ nigrajn kolorojn. Post unio de Lublin (1569) plifortiĝis poligo. Ŝajnis, ke ukrainojn kaj belorusojn estos pli facile asimili, ĉar ili laŭ etna kaj lingva aspektoj estas parencaj al poloj. Asimiligan danĝeron fortiĝis projekto de eklezia (ortodoksa kaj katolika) unio (1596). Malakceptantoj de eklezia unio verkis polemikan literaturon. Kontraŭ uniaj tendencoj militis ortodoksaj popoloj kaj monaĥoj, ankaŭ lernejoj de monaĥaj organizoj. Ili orientiĝis al modeloj de rusa kaj greka edukado, tamen ne evitis ankaŭ okcidentan influon. En komenco de 18a jc. en Kievo fondiĝis lernejo de akademia tipo, prototipo de estontaj universitatoj de Ukrainio.

Jam en 17a jc. plifortiĝis rolo de Ukraina kozakaro, amasiĝinta en Zaporozje. Vorto *kozako* devenas el tjurka lingvo. Ĝi signifas gardisto, gardostaranto. Kozakoj gardis landlimojn de Ukrainio de tataroj, poste de polaj agresoj. Aron da kozakoj pligrandigis urbanoj kaj vilaĝanoj de apudaj distriktoj. Ekde 16a jc. kozakoj havis siajn gvidantojn (estrojn) – hetmanojn. Aroj da kozakoj vojaĝis tra la Nigra Maro, ili timigis turkan sultanon kaj magnatojn de Pollando. Unu el pli famaj hetmanoj – Bogdan Ĥmelnickij – gvidis ribelon de Ukrainio kontraŭ Pollando en 1648. La ribelo plilongiĝis, kaj la hetmano komencis serĉi unuiĝon kun Rusia caro. Post unuiĝo kun Rusio (1654) konstante malgrandiĝis rajtoj de ukrainoj. Promesita aŭtonomio okazis fiktiva. Moskvo, ekvidinte, ke teni en sia regado tutan Ukrainion, kiun pretendis Pollando, estos malfacile, rifuzis dekstran bordon de Dnepro, sekve, dekstraborda Ukrainio trafis al Pollando, kaj la maldekstra – al Rusio. Tiu disiĝo ege ĉagrenis ukrainojn. Finfine post tria disdiviĝo de Litova-Pola ŝtato (1795) tuta Ukrainio, krom Okcidenta (ĝi apartenis al Aŭstro-Hungario), trafis al carisma Rusio. Trafis ankaŭ belorusaj teroj.

Post kultura orientiĝo al Okcidento, nun ĝi ŝanĝis direkton al Moskvo kaj Peterburgo. Vere, kontraŭeco inter oficialaj ortodoksa kaj katolika konfesioj kvazaŭ ne ekzistis. Malaperis kaj minaco de poligo. Bedaŭrinde, aperis alia minaco – rusigo. Jam imperiestrino Jekaterina II servutulis ukrainojn, ekstermis Seĉon de Zaporozje (popola kunveno de kozakoj), kiu simbolis nacian fieron kaj libereco. Ukrainio perdis eĉ sian nomon. Ĝin komencis nomi Malgrandrusio kaj la lingvon – lingvo de malgrandrusoj. Oni deklaris, ke ne ekzistas belorusa nek ukraina lingvoj, ili estas nur dialektoj de la rusa!

Nacioj, strebante ne malaperi, devis elbatali rajtojn por sia denaska lingvo, kaj tio ne estis facile. Intelektuloj de ambaŭ nacioj jam komencis kliniĝi al pola kaj rusa kulturoj. Fortiĝis diferenco inter urboj kaj vilaĝoj. Urboj asimiliĝis pli rapide. Nur en vilaĝoj oni gardis naciajn morojn, vivmanieron, lingvon, kantojn kaj fabelojn.

*Aida ČIŽIKAITĖ*



## LITOVAJ NACIAJ VESTOJ



*Vestoj de baltoj antaŭ mil jaroj*

Litovaj naciaj vestoj estas trispecaj: antaŭhistoriaj, historiaj kaj popolaj. Proksimuman aspekton de antaŭhistoriaj vestoj oni rekonstruas surbaze de arkeologiaj trovaĵoj, laŭ restaĵoj de vestoj kaj ornamaĵoj, laŭ antikvaj gravuraĵoj. Precipe multe da historiaj litovaj vestoj skizis pola pentristo Jan Matejko (1838-1893).

En Litovio oni distingas kvin etnajn regionojn, kies naciaj vestoj iomete diferencas per koloroj kaj fasonoj. Tiuj regionaj etnoj estas: aŭkštajtoj, dzukoj, suvalkanoj, ĵemajtoj kaj klajpedanoj. En vestoj de aŭkštajtaj viroj dominas grizaj kaj brunaj koloroj; en virinaj vestoj – blanka koloro. Dzukoj portadis grizajn jakojn; virinaj vestoj estis pli buntaj. Por suvalkanoj karakteraj estis blankaj aŭ grizaj jakoj kaj pantalonoj, virinoj portadis malhelajn jupejn kaj buntegajn antaŭtukojn. En ĵemajtaj vestoj abundis riĉaj malhelaj koloroj, piedvestoj – botoj aŭ lignaj ŝuoj; virinaj jupej kaj antaŭtukoĵoj laŭlonge striitaj. Por vestoj de klajpedanoj karakteraj estis malhelaj koloroj; virinaj jupej falditaj kun nigraj, bluj strioj, antaŭtukoĵoj buntaj. *(Po tri paroj da nacie vestitaj homoj el ĉiu etna regiono estas prezentitaj en serioj de koloraj poŝtmarkoj sur lasta kovrilpaĝo).*

Ni priskribu apartajn vestopartojn de kapo ĝis piedoj.

**Kapvestoj** en antikveco estis lanaj ĉapetoj ornamitaj per latuno. Pli poste nobeloj portadis ĉapojn el zibelaj feloj, malpli riĉaj homoj – el feloj de ursoj, vulpoj, kastoroj. Kamparanoj somere portadis ĉapelojn el pajlo, vintre – el lano aŭ felto. Vilaĝaj knabinoj somere ornamis la kapojn per rutoj kaj aliaj floroj, aŭ portadis kudritajn “kronojn”, kaptu-

Dum jarcentoj ĉiu nacio laŭ siaj vivkondiĉoj, bonstato, metia lerteco, laŭ sia kompreno de belo kreis kaj ŝanĝis modon de siaj vestoj. Ankaŭ diversaj religioj influis vestostilon. Militistoj, nobeloj, metiistoj, komercistoj, kamparanoj vestadis sin malsame. Geografiaj kaj klimataj kondiĉoj, ankaŭ naciaj moroj kreis specifajn vestojn, karakterajn por certaj nacioj. Ornamaĵoj, brokaĵoj, brodaĵoj servis por montri certajn vestpartojn, emfazante ilian gravecon aŭ reliefigante iun korpoparton. En fino de 19a, komence de 20a jarcentoj vestaj diferencoj de diversaj nacioj malaperis. Naciaj vestoj trafis en muzeojn, sed iliaj imitaĵoj iam reaperas dum festivaloj kaj naciaj festoj.



*La patrino, kies kapo vestita per "nuometas"*

kojn. "Kronoj" estis farataj el dikpatera arketo, tegita per ŝtofo kaj ornamita per silkaj aŭ brokataj rubandoj, trikaĵoj, zonetoj, globetoj. Ĉe la "krono" estis fiksitaj 2, 4, 6 aŭ 8 longaj rubandoj, kies finoj surdorse atingadis talion.

Antikva kapvesto de edziniĝintaj virinoj nomiĝis "nuometas" [nūo'metas]. Ĝi havis formon de viŝtuko, estis farita el delikata lina teksaĵo kaj ornamita per vitraj globetoj, latunaj spiraloj. Plejofte "nuometas" estis kunligita ĉe dekstra tempio. Ĝin

portadis virinoj en nord-orienta Litovio eĉ ĝis komenco de la 20a jarcento.

**Ĉemizoj** estis blankaj, kudritaj el lina teksaĵo; manikoj, kolumo kaj brusta parto estis ornamataj per brodaĵoj kaj trikaĵoj.



**Veŝto** estis senmanika vira kaj virina vesto, kudrata el lanaj, duonlanaj, kotonaj teksaĵoj, el brokato, silko, veluro. Virinaj veŝtoj estis mallongaj, duonlongaj kaj longaj.

**"Serméga"** – supra vesto, siaspeca longa jako, portita de viroj kaj virinoj ĝis komenco de la 20a jarcento. Ĝi estis kudrata el lanŝtofo, ornamita per veluro kaj plektaĵoj. Longa ĝis genuoj, alpremiĝinta ĉe talio. En malsupra parto ĝi havis kelkajn faldojn.

**Antaŭtuko** – parto de ĉiutaga aŭ dekoracia vesto, kovranta talion de antaŭa flanko. Tradiciaj antaŭtukoj estas parto de naciaj vestoj, ili estis teksataj el lano, kotonno, silko kaj ornamataj per riĉaj koloraj brokaĵoj (la bildo dekstre apude).

**Jupo** – virina vesto, portata sur talio, parto de naciaj vestoj. Jupoj estas malsupraj kaj supraj, ĉiuta-





Supre maldekstre – ornamitaj zonoj; dekstre – rubando el cent ornameroj

gaj kaj festaj. Ilia longeco variis depende de modo. Jupoj estis kudrataj el linaj, lanaj, duonlanaj, kotonaj, silkaj teksaĵoj, lastatempe ankaŭ el sintetika ŝtofo. Ornamaĵoj kaj koloroj de jupoj respegulis regionajn diferencojn.

**Pantalonoj** estis parto de viraj vestoj. Ili estis buntaj aŭ unukoloraj, agordigitaj kun koloro de “sermêga” (jako).

**Zonoj** – parto de viraj kaj virinaj vestoj. Litovaj naciaj zonoj havas longecon de 2 – 3 metroj kaj larĝecon de 2 – 20 centimetroj. Ili estas teksataj, plektataj, trikataj el linaj, kotonaj, lanaj fadenoj. Plej vaste disvastiĝis zonoj kun geometriaj ornamaĵoj. Por ornambrakaĵoj estas karakteraj komplikaj kaj plantaj motivoj, kolora bunteco. Zonoj sen ornamaĵoj estis ege maloftaj. Virinoj per ili zonis longajn jupojn, kunligis ŝtrumpojn, kunplektis veŝtojn; viroj zonis ĉemizojn, pantalonojn, suprajn vestojn.

Naciaj zonoj – renaskiĝanta tre malnova branĉo de litova popolararto. Kiam populariĝis folkloraj kaj etnografiaj ensembloj, ankaŭ kantofestoj, la zonoj denove fariĝis nepra parto de nacia kostumo. Nun ili havas ankaŭ pure dekoracian destinton – per ili estas ornamata hejma internaĵo. Ĝis hodiaŭ zonoj restis plej populara donaco ne nur dum geedziĝo, sed ankaŭ por estimataj gastoj.

*Albinas PEČELIS*

## MOZAIKO DE LITOVIA VIVO

• 2002 06 11 en Luksemburgo okazis ministrnivela intertrakta renkontiĝo inter Eŭropa Unio (EU) kaj Litovio. En ĝi EU oficiale agnoskis, ke Litovio ne povos fermi Ignalinan Atoman Elektrocentralon (IAE) nur per propraj penoj. Tio estus tro peza ŝarĝo por la lando. Tial landoj-membroj de EU sindevigas liveri al Litovio longdaŭran subtenon, eble eĉ la kelkdekjaran. Siavice Litovio sindevigas fermi duan blokon de IAE en 2009. Tamen nur kun ĉefa kondiĉo. “Niajn sindevigojn fermi la duan blokon en 2009 ni konfirmos nur interkonsentinte pri la sumoj. Kiel diras ĉefministro Algirdas Brazauskas, se ne estos mono, ne okazos ankaŭ la fermo”, – asertis ministro pri eksterlandaj aferoj *Antanas Valionis*. Litovio intencas peti de EU 2,4 miliardojn da EUR. Ĉi tiu sumo estis pritraktita dum neoficialaj konsultadoj kun Eŭropa Komisiono.

• 2002 06 16-17 unufoje Litovion vizitis Ĉinia ŝtatprezidento *Jiang Zemin*. La vizito vaste eĥiĝis en la lando, ĉar litovaj policistoj dum ĝi ekuzis forton. Ili en Vilna aerhaveno perforte forprenadis sloganafiŝojn, Tibetajn flagetojn kaj flagojn for de protestantoj kontraŭ ĉina politiko en Tibeto. Apud la prezidentejoj, kie estis atendata la gasto, estis haltigita defendantino de libereco en Tibeto verkistino *Jurga Ivanauskaitė*. Policistoj tenis ŝin dum kelkaj horoj en aŭtomobilo. Tamen la komisiono, esploriginte agojn de polico, konstatis, ke ĝi ne superis donitajn rajtojn. Oni pardonpetis pro iuj malĝentilaĵoj. Tamen flagetojn de Tibeto la ĉina prezidento ekvidis. Du parlamentanoj ilin tenis renkontante la Ĉinian ŝtatestrojn en parlamenteja vestiblo. Pro tia elpaŝo prezidento Jiang Zemin, malkiel estis planite, ne intersalutis kun prezidanto de Litova Sejmo *Artūras Paulauskas* renkontinta lin sur ruĝa tapiŝo, sed tuj iris al Blanka Salono, dediĉita por la renkontiĝo.

• 2002 07 09 reprezentantoj de Rusia socia fonduso *Centro de Rusia Nacia Gloro* enmanigis al litova ŝtatprezidento *Valdas Adamkus* premion de sankta Andreo pro flegado de dialogo inter civilizacioj. La honorpremio estas atribuita al V.Adamkus pro lia kontribuo en disvastigo de internacia dialogo kaj paco. V.Adamkus kaj prezidentoj de Pollando kaj Ukrainio estis iniciatintoj kaj protektantoj de internacia konferenco *Dialogo inter civilizacioj* okazinta pasintjare en Vilnius. Al V.Adamkus estis alfiksita Stelo de Andreo kun 389 noblaj gemoj, enmanigitaj laŭreata diplomo, laŭreata zono kaj ikono de sankta Andreo, pentrita de nuntempaj ikonopentristoj. Ĉi-jare la honorpremioj de sankta apostolo Andreo estis enmanigitaj ankaŭ al Azerbajĝana prezidento *Heidar Alijev* kaj ĝenerala sekretario de Unesko *Koichiro Matsuura*.

• 2002 07 29-31 Litovio adiaŭis kun poeto *Bernardas Brazdžionis*. La poeto forpasis la 11an de julio en Los Angeles (Usono) en 96a jaro de la vivo. B.Brazdžionis pro minacantaj persekutoj de soveta reĝimo en 1944 foririĝis el Litovio. En Antologio de klasika litova literaturo B. Brazdžionis estas nomata unu el plej elstaraj litovaj poetoj. Li eldonis ĉ. 50 librojn kaj versajarojn. Dum la Sendependeca periodo la poeto iĝis laŭreato de Poezia Printempo, honora civitano de urboj Kaunas kaj Pasvalys, honora doktoro de Kaŭna Universitato Vytautas la Granda. Li estis honorita je Ordeno de Grandduko Gediminas (1a grado). Papo Johano Paŭlo la Dua honoris la poeton je medalo *Pro Ecclesia et Pontifice* kaj je plejalta agnoska insigno de Vatikano La Granda Komandora Ordeno de Sankta Gregorio. La poeto estis enterigita la 31an de junio en Kaunas.

• Naŭ el 10 pridemanditoj opinias, ke en Litovio estas deliktataj homaj rajtoj. Tion montris la esploro, plenumita de Esplorcentro de Socia Opinio kaj Merkato *Vilmorus*. Ĉ. 40% da pridemanditoj asertas, ke homaj rajtoj en Litovio estas malobservataj konstante. Pli ol 40% opinias, ke tiaj deliktoj okazas iam, kaj nur 3% respondis, ke homaj rajtoj en Litovio ne estas deliktataj. La esploro montris, ke plej ofte oni deliktas rajtojn al laboro, sufiĉaj salajro kaj vivtena nivelo. Pli ol

70% pridemanditoj asertas, ke en Litovio ne estas garantiata rajto de infanoj ricevi sufiĉan ŝtatan vivtenon. La esploro montris, ke iuj rajtoj en Litovio estas efektive defendataj. Ĉ. 90% da respondintoj opinias, ke en Litovio ne estas subpremataj kredaj kaj religiaj liberecoj. 65% da pridemanditoj respondis, ke en la lando estas garantiata rajto al libereco de vorto, kaj 54% asertas, ke en Litovio estas efektive defendataj rajtoj de naciaj minoritatoj.

- Sur konstruaĵoj de Vilna malnova urbo, kie antaŭ la milito estis lokiĝintaj vendejoj de keroseno kaj de koloniaj varoj, aperis malnovaj surskriboj en jida kaj pola lingvoj. Unuaj surskriboj, kaŝitaj sub farba tavolo, estis malkovritaj sur muro en strato Žemaitijos. La malnovaj surskriboj en antaŭmilita juda kvartalo estas restaŭrataj plenumante decidon de Litova Sejmo pri rekreo de fragmentoj de Vilna historia getto. Ĝis la Dua mondmilito 40% da Vilna loĝantaro estis judoj.

- En teritorio de Vilna Malsupra kastelo arkeologoj trovis 62 arĝentajn monerojn el tempo de litova grandduko kaj pola reĝo *Jogaila*. Sur iuj moneroj estas stampita portreto de Jogaila. Povas esti, ke ĝi estas la plej malnova konata portreto de la litova regnestro. Historiaj donitaĵoj atestas, ke post la kristanigo en 1387 ĉi tiuj moneroj jam estis stampataj. En 15a jc. ilin el mona cirkulado elpuŝis tiel nomataj Pragaj groŝoj.

- 2002 06 26 Litova Ŝtatbanko emisiiis 50-lidan arĝentan memormoneron dediĉitan al temo *Litovia naturo*. Sur la monera reverso estas bildigita strigo (litove *Liepsnotoji pelėda*, latine *Tyto alba*), kiu estas enskribita en la Ruĝan Libron de Litovio. La arĝenta (Ag 925) monero pezas 28,28 g. ĝia diametro estas 38,61 mm, eldonkvanto – 3000 ekz., vendoprezo – 90 Lt (ĉ. 26 EUR). Aŭtoro de la monero – skulptisto *Giedrius Paulauskis*. La monero estas kreita partoprenante en internacia progamo *Ni gardu naturon*. En Litovio restis nur ĉ. 30 paroj de ĉi tiuj birdoj.

- Unua olimpia ĉampiono de sendependa Litovio diskoĵetisto *Romas Ubartas* estas plene rehabilitita post tio, kiam en lia organismo estis trovita dopilo. Printempe Internacia Leĝeratlletika Federacio (ILAF) informis, ke en testita urina provaĵo de la sportisto estas trovita malpermesita medikamento boldenono. Post iu tempo farita ripeta testado tion konfirmis. R.Ubartas mem ĉiam asertis, ke li ne uzis dopilon. Disciplina Komisiono de Litova Leĝeratlletika Federacio (LLAF) oficiale suspendis lian sportan agadon. Laŭ peto de LLAf, ILAF prenis ankoraŭ 2 urinajn provaĵojn kaj post ilia testado eldiris verdikton: “La diskoĵetisto estas senkulpa”. En la monda praktiko ĉi tiu kazo estas senprecedenta. Laŭ la regularo de ILAF, rezultoj de 2a kaj 3a testadoj ne povis plene senkulpigi la sportiston. ILAF povis proponi nur pli mildan punon. Al R.Ubartas minacis vivdaŭra malpermeso partopreni en sportaj konkursoj.

- *Raimondas Rumšas* faris tion, kion ĝis nun neniu litova biciklisto sukcesis fari. 2002 07 28 en Parizo post 3-semajna konsumanta lukto finiĝis plej prestiĝa monda multtaga biciklada konkurso *Tour de France*. En ĝi 30-jara litova biciklisto R.Rumšas reprezentanta italan klubon *Lampre-Daikin* okupis la trian lokon. Li cedis nur al usonano *Lance Armstrong* kaj hispano *Jose Beloki*. Eksterlandaj televidaj komentistoj ne avaris laŭdojn al litova sportisto. Iuj asertis, ke de nun pli fama ol R.Rumšas estas nur unu litovo – basketbalisto Franvydas Sabonis.

Tamen post la triumfo sekvis skandala informo. Franca polico arestis kaj enprizonigis edzinon de la biciklisto *Rita Rumšienė*. Ŝi estas akuzata pri provo enveturigi en la landon malpermesitajn medikamentojn. Iuj el ili povas esti uzataj kiel dopiloj. R.Rumšienė deklaris, ke la medikamentoj estis dediĉitaj por ŝia patrino, kiu antaŭ kelkaj jaroj suferis komplikan operacion. La klubo *Lampre-Daikin* provizore haltigis sportan agadon de R.Rumšas, ĝis klariĝos, ĉu li estas iamaniere kunligita kun dopila afero. Cetere, el la sportisto antaŭnelonge por testado estis prenitaj urina kaj sanga provaĵoj. La respondo estis negativa.

Hipotezo

## Litovlingva teksto skribita antaŭ 2000 jaroj

**Ekparolis etruskaj skribsignoj.** Jurij Lipovka, loĝanta en Litovio, asertas, ke li sukcesis malkovri sekreton de unusola ĝis nun ne tralegita teksto de etruskaj skribsignoj.

Ĉi tiu teksto – priskribo de korpa mumio. Ĝi estas skribita sur lintola volvaĵo, en kiun estis volvita mumio, trovita en tombo proksime de Kairo (Egiptio). Arkeologoj datas la trovaĵon al mezo de la unua jarcento antaŭ Kristo. La mumio kune kun la lintolo en la 19a jarcento estis transportita al Zagrebo kaj ĝis nun estas gardata en loka muzeo.

Se ĉi tiu malkovro estos konfirmata, ĝi estos la dua konata priskribo de la mumio. La unuan tekston pri tio, kiamaniere egiptoj mumiiĝas riĉulon, en la 5a jarcento priskribis greka historiisto Herodoto.

Sed la plej sensacia aserto de J.Lipovka estas tia: tralegita fare de li teksto en etruskaj skribsignoj estas *litovlingva*. Do en Zagrebo gardata lintolo, sur kiun antaŭ pli ol 2000 jaroj estis skribita teksto, povas fariĝi la unua konata litova skriba fonto.

**La teksto sonas litovlingve.** Sur la lintolo, en kiun estis volvita la mumio, J.Lipovka tralegis jenan tekston (ĉi tie ni prezentas nur parteton de litova teksto; la originalo estas sen interpunkciaj signoj, kelkaj vortoj mallongigitaj; en rektaj krampoj – preterlasitaj, ne komprenitaj aŭ divenataj literoj kaj vortoj).

*“Sĕtą [...] mĕldĕm [...] visiĕms. Sĕto bus p-a [palaima] mĕr-ss [mirusiesiems]. Rybos [kapo ribos] ĉia v-sms [visiems] vagĭms ĵiems bus. Bajsiausios mirties ĵiems sk-s [skirs] baumes ir ĵiems sk-tos [skirtos] neĵinomos r-s [rūšies] m-s [mirtinos] ligos tamsios mĕrs siela, maras, bajsus karas ĵumis ištiks. Tas kuris palies kapą bus mĕr-m [mirtim] pasmia-s [pasmĕrkta].*

Esperanta traduko estas de la tuta teksto; krome, ĝi estas gramatike ordigita.

*Ni petegis Seton<sup>1</sup> por ĉiuj. Estos beno de Seto por mortintoj. Limoj de tombo estos ĉi tie por ĉiuj ŝtelistoj. Al ili estos destinitaj punoj de plej terura morto kaj de nekonata mortiga malsano; mortos animo, vin trafos pesto, terura milito. Tiu kiu tuŝos la tombon estos kondamnita al morto.*

*En maljunaĝo umu patro mortis. Li estis soleca viro, malsanis. La mortinto estis ŝtonĉizisto Tenei. Lian korpon ni [...], sekcis, poste lavis, ŝmiris per oleo, ĉie purigis putraĵojn, plukis [?] liajn generajn organojn, tralavis intestaron, kunverŝis sangon, forigis hepaton, renojn, forigis pankreaton, sekcis stomakon. Tutan ventron ni ŝtopis, envolvis.*

*Ni levis [ĝin] en tombon fositan en kaverno, ĉar ni havis ĉi tie tiajn rajtojn<sup>2</sup>. [Nomoj de dioj] de mortintoj ni vokis vin ĉi tien. Iad [nomo] en buŝon de la mortinto*

<sup>1</sup> Seto – dio de antikvaj egiptoj, frato de Oziriso. Seto estis dio de tempestoj, dezertoj kaj reganto de eksteregiptaj landoj.

<sup>2</sup> Tomboj ĉizitaj en kaverno estis aĉetataj.

*metis tri monerojn de Izisa.*

*Sekcis ni lian stomakon, lavis, oleis. Venis voĉo de Seto, ni havis timon – terure. Ni kantis al li preĝkantojn. Ejid<sup>3</sup> tia voĉo de Seto ne timigos nin. Ĉiuj misteraj obskuraj preĝkantoj por li, ripozu en paco, en lia silento. Lanta vento estos por vi, kaj tiuj kun kiuj estos Ra, estos benitaj en Seto.*

**La esplorojn iniciatis skolto.** J.Lipovka – estinta milita analizisto kaj deĉifristo de Rusia Ĉefa Milita Skoltado (GRU). Antaŭ 8 jaroj li emeritiĝis. Li finis du superajn lernejojn pri skoltado, trairis tutan kurson de preparado de elitaj profesiuloj pri malkodigo kaj deĉifrado en Sovetia ĉefstabo. En la tuta USSR tiajn fakulojn ĉiujare oni preparis nur po kelkajn. Estinta elita oficiro studis informadikon, lingvistikon, kartografion, estas aŭtoro de kelkaj sciencaj verkoj. Li parolas rusan, litovan, germanan, anglan, latvan, holandan lingvojn, komprenas la malnovajn grekan kaj latinan.

“Surbaze de informoj el pasinteco kaj nuntempo, milita analizisto devas diveni estontajn eventojn. Mi, sciante la nuntempon, provis ekrigardi al pasinteco”, – rakontis J.Lipovka, multajn jarojn analizinta mapojn, arkeologiajn kaj historiajn fontojn.

**Litovlingva skribaĵo en Kreto.** La analizisto asertis, ke li sukcesis tralegi ĝis nun ne komprenitan Kretan linian A skribon, uzitan en la 17a jarcento antaŭ Kristo kaj antaŭ tri jarmiloj en nuntempa Jemeno kaj Etiopio.

Dum la unua jarmilo antaŭ Kristo etruska literaro estis disvastiĝinta sur teritorio de hodiaŭa Italio kaj Norda Balkanio, kie loĝis multaj popoloj. Uzante etruskan literaron ili skribis en siaj propraj lingvoj. Kelkajn konserviĝintajn restaĵojn de etruskaj skribaĵoj J.Lipovka deĉifris en rusa, kelta, germana lingvoj.

La esploristo asertis, ke surskriboj trovitaj sur ŝtonaj platoj en insulo Kreto estas faritaj en litova lingvo, kaj tiutempe tie loĝintaj trakoj estis parencaj al ĵemajtoj<sup>4</sup>.

Sur unu el trovitaj argilaj platetoj (bildo apude) estas skribite:


*“Pietu jur.ra. eg / s.mei.ge. po.ra / jos.vi.ru / ž.u.vo / pietu.sie. 100 f.inik.ieĉiu / sti.e.bu”*

J.Lipovka opinias, ke tio povas esti mesaĝo de ĉelimaj gardistoj kaj en litova lingvo ĝi tekstas:

*“Pietu ĵūra. Egiptieĉiaj smeigē [užpuolē], pora ju vyrų žuvo. Pietuose 100 finikieĉiu [laivu] stiebu”.*

En Esperanto tio signifas:

*“Suda maro. Egiptoj pikis [atakis], paro da iliaj viroj pereis. En sudo 100 fenicaj mastoj [de ŝipoj]”.*



<sup>3</sup> Ejid – dio de mortintoj.

<sup>4</sup> Ĵemajtoj – etna grupo de litovoj, loĝanta en Okcidenta Litovio ĉe Balta Maro.

**Misteraj itineroj de popoloj.** J.Lipovka asertis, ke li komprenis de kie antaŭ kelkaj jarmiloj al nuna loĝloko venis multaj Eŭropaj popoloj. Li opinias, ke aŭkŝtajtoj<sup>5</sup> al-migris al Balta maro de rivero Lena en Siberio, kaj ĵemajtoj – el Hindio. Tie praloĝantoj de litovoj nomiĝis trakoj.

Parto da trakoj venintaj al nuna Ĵemajtio pli poste retiriĝis al Balkanoj kaj Grekio. Ĉi tie imperio de trakoj influis kulturen evoluon de nunaj Eŭropaj popoloj.

Itinero de ĉiu popolo indikas loknomoj restigitaj sur migrovojo. Havante eblecon uzi mapojn de Rusia Armea Ĉefstabo, sur kiuj estas notitaj plej malgrandaj vilaĝetoj kaj riveretoj, J.Lipovka konkludas, ke en ŝtonepoko litovoj loĝis sur teritorio de hodiaŭa Italio. Nomoj de iuj tieaj urbetoj devenas de vorto “ola” (litove – kaverno) kaj sonas tute litove: *Airola* (apud Benvento), *Agerola* (sude de Napolo). Ĉe urbo Padovo estas vilaĝo *Anga* (litove – aperturo), oriente de Mantuo – vilaĝo *Nogara* (litove “nugara” – dorso). Apud Napolo estas urbeto *Kuma* (litove “kŭma” – baptopatro); en Toskana provinco estas urbo *Siena* (litove – muro). Okcidente de urbo Bari fluas rivereto *Puglia* (de litova vorto “pŭgžlys” – fiŝo *Acerina cernua*; itala lingvo ne havas sonon “j”, do ĝi elfalis el la nomo).

Italaj lingvistoj konfirmis al J.Lipovka, ke la menciitaj loknomoj ne devenas el itala lingvo.

**Spuroj en Siberiaj vastaĵoj.** Antaŭ kelkaj jardekoj rusaj arkeologoj pruvis, ke ĉe rivero Lena, en regiono de nunaj Jakutsk, Irkutsk, Ĉita kaj Amursk, en la 4a-3a jarcentoj antaŭ Kristo loĝis ne slavdevena popolo. Pri ĝi mencias ankaŭ ĉinaj skribaj fontoj.

Devenon de ĉi tiu popolo atestas postrestintaj litovaj loknomoj, kiujn pli malfacile prononceblajn kripligis postaj alvenintoj.

En grandan Siberian riveron Angara enfluas *Ilga* (litove – longa). En regiono de Ĉita estas rivero kaj loĝloko *Itaka* (litove – enfluejo); en regiono de Jakutsk estas urbo *Peleduj* (litove “pelèda” – strigo); apud urbo Bratsk estas *Artumej* (litove “artumoje” – en proksimeco).

Arkeologiaj trovaĵoj montras, ke tiu popolo en la 3a jarcento antaŭ Kristo subite foriris. Oni opinias, ke ĝin elpuŝis hunoj, venintaj el sudoriento.

**Migris kune kun salioj.** Surbaze de loknomoj kaj publikigitaj arkeologiaj esploroj J.Lipovka asertis, ke kune kun aŭkŝtajtoj el Fora Oriento al Eŭropo migris ankaŭ salioj. Tio estis franka gento, de kiu devenis nuntempaj francoj.

Laŭ tuta itinero de aŭkŝtajtoj apud litovaj loknomoj estas double-triole pli da loknomoj, kiuj estas franc-devenaj. El tio oni povas konkludi, ke salioj laŭkvante estis kelkoble pli multnombraj. La vorto “aŭkŝtajto” estas hodiaŭa termino, tiutempe ili nomiĝis litovoj. Pri ili aperas mancio en fino de la 5a jarcento. En la unua leĝaro de reĝo Klodvigo I estas eldiro: “*Frankoj kaj litoj rajtas...*” Sciencistoj ĝis nun ne povas klarigi, kio estas tie menciataj *litoj*. J.Lipovka opinias, ke reganto Klodvigo I en la leĝaro mencias siajn aliancanojn litovojn, kune kun kiuj salioj migris el Siberio.

<sup>5</sup> Aŭkŝtajtoj – alia etna grupo de litovoj, loĝanta en Orienta kaj Suda Litovio. En la 19a jarcento oni klare distingis: litovoj kaj ĵemajtoj, litova kaj ĵemajta lingvoj.



**Ĵemajtoj estas antikvaj trakoj.** Ĵemajtoj en la 8a jarmilo antaŭ Kristo migris el Italio al Hindio kaj lokiĝis proksime de nuntempa urbo Bhilai. Ĉi tiu teritorio nomiĝis Trakio kaj la venintoj alprenis nomon trakoj.

En Hindio konserviĝis loknomoj, kiuj sonas litove: *Baisi* (lit. terura), *Banga* (ondo), *Biaura* (lit. "bjaurus" – abomena), *Dievas* (Dio), *Kalna* (lit. "kalnas" – monto), *Kalnai* (montoj), *Kalva* (monteto), *Malda* (preĝo), *Purva* (lit. "purvas" – koto). Multaj el tiuj vortoj ne estas parencaj kun Sanskrito.

Sude de Delhio estas monto *Peda* (piedo). En Tibeto estas vilaĝeto *Ŝunsargis* (lit. hundo-gardisto), kies signifo por lokaj loĝantoj estas tute ne konata.

En la 3a jarmilo antaŭ Kristo tajoj elpuŝis trakojn el Hindio. Ili elmigris kaj unu parto haltis ĉe Balta Maro, alia parto iris al Balkanoj kaj tie kreis imperion, kiun en la 2a jarmilo antaŭ Kristo detruis grekoj, etruskoj k.a. popoloj.

*Laŭ artikolo de Alvydas ZIABKUS ("Lietuvos Rytas")*

**Rimarko de la redaktoro.** Tute ne kredebla ŝajnas aserto, ke teksto ĉe egipta mumio povus esti litovlingva. Eĉ la termino mem "litova lingvo" aspektas dubinda, oni povus paroli nur pri iu litova dialekto de tiama balta pralingvo. Tamen restas nerefutebla fakto, ke la nuna litova lingvo estas la plej antikva vivanta hindeŭropa lingvo, konservinta similecon ne nur kun la balta, sed ankaŭ kun la hindeŭropa pralingvo. Tiuaspekte oni povus kondiĉe uzi terminon "litova lingvo" parolante pri tia malproksima epoko.

Verŝajne ni ankoraŭ multon ne scias pri tiuj antikvaj tempoj, pri ligoj inter popoloj. Ĉi-sube mi volas rakonti pri ankoraŭ unu, ne malpli stranga, fakto.

## Egiptaj dioj en litova tero

En 1852 apud urbeto Ŝvėkŝna (Okcidenta Litovio) en antikva tombejo estis trovitaj 7 bronzaĵ statuetoj. La trovinto (grafo Adomas Plateris) opiniis, ke ili prezentis litovajn diojn, sed evidentiĝis, ke tio estas egiptaj dioj Oziriso, Izisa kun bebo, Horo, Beso kun muzikilo, preĝanta egipta pastro. Unu statueto estis kato, sankta besto de egiptoj.

Ĉar la trovaĵo estis unika kaj sensacia, ĝi elvokis ankaŭ skeptikecon. Aperis suspektoj kaj akuzoj, ke la statuetoj estis falsitaj, ke tio estas mistifikaĵo, kaj lastatempe – ke ili entute ne ekzistis. Sed en la jaro 1984 du statuetoj (de Oziriso kaj de pastro) kaj muldaĵo de la tria (ankaŭ de Oziriso; ĝia originalo estis arĝenta) estis retrovitaj en tenejoj de Vilna Historia Muzeo. Egiptologoj de Moskvo kaj Leningrado ne dubis pri ilia aŭtentikeco kaj datis ilin al mezo de la unua jarmilo a.K. Sorto de aliaj statuetoj ne estas konata, sed pri ilia ekzisto kaj vereco ne indas dubi, ĉar ekzistas kelkaj pentraĵoj de ĉiuj 7 statuetoj. Tamen restas la demando: kiamaniere egiptaj dioj trafis en litovan teron?

Oni ne rajtas refuti ankaŭ version, ke ili trafis ĉi tien laŭ komerca vojo. Ja estas konata Sukcena Vojo, laŭ kiu sukceso de Balta Maro atingadis Romon, Grekion kaj Egipton. Sekve laŭ tiu vojo vojaĝis komercistoj, ili povis alporti ankaŭ egiptajn statuetojn. Kompreneble la statuetoj ne estis objekto de adorado, litovaj havis proprajn diojn.

*Petras ĈELIAUSKAS*

## El interreto

# Kostoj de multlingveco

## Faktoj kaj novaĵoj por ekstera informado pri Esperanto

Claude Piron aperigis en <rebato@yahoogroups.com> kolekton de citaĵoj rilataj al la lingva problemo en la mondo. Tre rekomendinda por la ekstera informado!

"Tradukado kaj interpretado kostas al ĉiu Eŭrop-Unia impostpaganto nur 2 eŭrojn ĉiujare": Oscar Doerflinger, "Le multilinguisme dans les institutions europeennes" en Robert Chaudenson, red., \*L'Europe parlera-t-elle anglais demain?\*, Parizo: Institut de la Francophonie, L'Harmattan, 2001, paĝo 137 [Oskar Doerflinger estas konsilisto ĉe la Komuna Interpreta-Konferenca Servo de la Eŭropa Komisiono, france: *Service Commun Interpretation-Conference de la Commission Europeenne*].

"En 1991 ĉiu vorto tradukata en Eŭropa Unio kostis 0,36 USD": Roman Rollnick, "Word mountains are costing us a fortune", \*The European\*, 1991/12/20-22, paĝo 6.

"En UN, la kosto de skriba tradukado en ses lingvojn tie estis 1,42 USD por unu vorto": Joint Inspection Unit, \*Evaluation of the Translation Process in the United Nations System\*, (Geneva: UN, 1980; document JIU/REP/80/7), deduktebla de tabelo 9 (sen paĝnumero, fine de la dokumento).

"La lingvoservoj de la Eŭropaj institucioj enhavas "proksimume 3000 tradukistojn, kaj 951 interpretistojn, por suma kosto de 685 milionoj da eŭroj": Oscar Doerflinger, "Le multilinguisme dans les institutions europeennes" en Robert Chaudenson, red., \*L'Europe parlera-t-elle anglais demain?\*, (Parizo: Institut de la Francophonie, L'Harmattan, 2001), paĝo 137.

"En 1989, Eŭropa Unio havis 2500 tradukistojn kaj 600 interpretistojn-funkciulojn; sed ĝi krome uzis la servojn de 2500 sendependaj interpretistoj ("free-lance interpreters")": Mario von Baratta kaj Jan Ulrich Clauss, \*Internationale Organisationen\* (Frankfurt am Main : Fischer, 1991), p. 146.

"La baldaŭa aldonado de novaj lingvoj kustos 193 milionojn da eŭroj por ok pliaj lingvoj": Rafaele Rivaïs, "L'elargissement de l'Union pose le probleme de l'egalite des langues", \*Le Monde\* (2001/08/08) [http://www.lemonde.fr/article/0,5987,3214--13490\\_00.html](http://www.lemonde.fr/article/0,5987,3214--13490_00.html).

"La unua kaŭzo de morto ĉe infanoj malpli ol 5-jaraj estas la diareaj malsanoj, aŭ pli precize la senakvigo (dehidratigo), kiun ili kaŭzas kaj kiu estas tiel grava, ke la korpo de la infano ne plu produktas larmojn, kiam ĝi devus plori": UNICEF, "A miracle cure to stop 7000 children dying each day from diarrhea", \*Time Magazine\* (1990/11/26), p. 15

"Por korekti tiun mankon de akvo ekzistas tre simpla rimedo, la t.n. buŝa rehidratiga traktado. Mil tiaj saketoj kostas 84 eŭrojn (73 USD)": \*Agenda UNICEF\*, franca eldono, 2001. [Angle oni diras "TRO sachets"].

"La ĉefa kaŭzo de infana blindeco estas kseroftalmio: protekti kontraŭ ĝi kostas nur 0,13 eŭrojn por unu infano por unu jaro" (Mi transigis al nunaj eŭroj koston esprimitan en usonaj dolaroj – USD 0,12 – de 1975): Genevo: Monda Organizo pri Sano, World Health Assembly, \*Press Release WHA/7\*, 1975/05/20. Eble la kosto plialtiĝis. Mi ne scias, kie trovi ion

pli freŝdatan. Estas tamen dube, ke ĝi duobligis, ĝi maksimume triobligis. Eĉ se ĝi iĝis 0,39 eŭroj, tiu kosto ne estas tre alta.

"Efika programo por lukti kontraŭ malario kostus jare nur 800 000 dolarojn. Sed ne troveblas mono por financi la necesajn agadojn. Ne estas mono por pagi la kunlaborantojn, por aĉeti la ekipojn, por havigi al si benzinon. Simple ne estas mono.": *Stan Stesser "Forgotten Country", \*The New Yorker\*, 1990/08/20, p. 7.*

"Ekzemple, se 4500 personoj – 3000 tradukistoj, 951 interpretistoj-funkciuloj kaj 549 portempaj interpretistoj": ĉar Oscar Doerflinger ne menciis la sendependajn interpretistojn, mi elektis verŝajnan nombron – fakte certe malsuperan al la realo, se kompari kun la cifero de 2500 en 1991 ĉi-supre citita – por atingi ciferon facile penseblan (4500).

"En Eŭropa Unio okazas grandegaj elspezoj pro la triloka sistemo: la dokumentoj por la Eŭropa Parlamento verkitaj en Bruselo estas tradukataj en Luksemburgo kaj pridiskutataj en Strasburgo. En 1992 la transporto nur inter Bruselo kaj Strasburgo kostis 500 milionojn da francaj frankoj. La vojaĝo okazas dufoje ĉiumonate: 80 tunoj da paperoj en naŭ lingvoj ĉiufoje estis transportataj de Danzas": *Laurent Fontaine, "Le cout de la bougeotte", \*L'Instant\*, 1991/10/24-30, pp. 18-19.*

"La interpreta servo de la Eŭropa Komisiono estas nur unu servo inter pluraj, ĉar la Justica Kortumo kaj la Eŭropa Parlamento havas proprajn lingvajn servojn. La interpreta servo de la Komisiono havas 500 daŭrajn interpretistojn, kaj uzas 'ĉiutage' la servojn de 200 ĝis 300 portempaj, sendependaj interpretistoj ("free-lance")": *Oskar Doerflinger, "Le multilinguisme dans les institutions européennes", en Robert Chaudenson, red., \*L'Europe parlera-t-elle anglais demain?\*, Parizo: Institut de la Francophonie, L'Harmattan, 2001), p. 136.*

"Ili prizorgas la interpretadon en 45 ĝis 50 kunsidoj ĉiutage": [samloke]. "Tio signifas, jare, 125 000 interpretagojn": [samloke]. "Dans le cadre des negociations pour l'adhesion de nouveaux Etats membres, les problemes linguistiques ne sont pas souleves. (Kadre de la traktadoj por aliĝo de novaj Ŝtatoj Membroj, la lingvaj problemoj ne estas alirataj)": [samverke], p. 137.

"Le passage a un grand nombre de langues supplementaires posera des problemes d'efficacite et entrainera une augmentation des couts (Transiro al granda nombro da pliaj lingvoj starigos problemojn de efikeco kaj kaŭzos kreskon de la kostoj)": [sampaĝe].

"Kunsido kun 18 lingvoj necesigos la ĉeston de inter 55 kaj 60 interpretistoj. Oni do pli kaj pli aplikos la sistemon de duobla interpretado": [sampaĝe].

"En sciencaj kunsidoj, duobla interpretado estigas perdon aŭ fuŝon de 50% el la informoj prezentataj. ("at scientific meetings the loss of information through 'relay' is of at least 50%")": *C.E. King, A.S. Bryntsev, F.D. Sohn, \*Report on the implications of additional languages in the United Nations system\*, Geneva: UN, Joint Inspection Unit, 1977, doc. A/32/237, par. 93.*

"Per 134 eŭroj (US\$ 117) oni povas havigi al profesia akuŝistino la necesujon kun la iloj kaj medicinaj substancoj, kiun ŝi bezonas por kiel eble plej bone certigi senriskajn akuŝojn": *\*Agenda UNICEF\**, franca eldono, 2001.

"17 eŭroj (US\$ 14) sufiĉas por vakcine protekti unu infanon kontraŭ la ses plej mortigaj malsanoj: difterio, morbilo, kokluŝo, poliomiellito, tuberkulozo kaj tetano": *\*Agenda UNICEF\**, franca eldono, 2001.

"Por restarigi sanigan nutradon ĉe mis- aŭ sub-nutrataj infanoj dum unu jaro sufiĉas 10 usonaj dolaroj por unu infano (11,4 eŭroj)": *Info-Sud, Gazetara Bulteno, citita en*

\*L'Echo Magazine\*, 1990/10/06, p. 7. Mi havis konfirmon pere de amiko, kiu kolektas monon por Tibetaj infanoj en Hindio, ke tiu informo plu validas nun (tiu kosto ŝajne ne altiĝis dum 11 jaroj).

"Por nutri dum unu monato 70 infanojn en vietnama orfejo sufiĉas 400 eŭroj":

\*Svisa franclingva radio RSR-1\*, 1992/03/31, 07:50.

"Havigi bazan edukadon al ĉiuj kostus jare 6 miliardoj da USD": NDP (Programo de Unuiĝintaj Nacioj pri Evoluigo), \*Annual Report on World Human Development\* (Jara Raporto pri Tutmonda Homara Evoluigo), 1998 (citita en *Patrice Mugny "Quelques chiffres qui disent le monde et son (in)humanite"*, \*Le Courrier\*, 98/10/06, p. 5).

"Kontentigo de bazaj nutraj kaj sanecaj bezonoj por ĉiuj kostus jare 13 miliardojn da usonaj dolaroj": [samloke].

"En Usono 8 miliardoj USD estas elspeszataj ĉiujare por kosmetikaĵoj": [samloke].

*Claude Piron*

## LA REVUO "Merkato"

La revuo MERKATO eldonata de IKEF, estos pli kaj pli legata de nunaj kaj estontaj samideanoj en la tuta mondo. Ni ĵus legis la numeron 76, de aprilo 2002. La enhavo indas esti legata de ni ĉiuj. Estas bonŝanco povi ĝin konsulti kaj propagandi.

La kresko de "per-esperanto-komerco" ne nur ŝuldiĝas al la genia ideo de Renato CORSETTI krei ĝin kaj al la entuziasmo de iuj el ĝiaj membroj, sed ankaŭ al la laboro seninterrompa de por-esperantaj-komercaj-pioniroj kiel Franz Josef BRAUM kaj Roland ROTSAERT.

Plej inteligenta maniero danki al ili estas vidi en la progreso de komerco per Esperanto kaj reciproke Esperanto per komerco, unun el la plej grandaj solvoj por la problemo de la komunikado je ĉiuj niveloj. Mi persone kredas ke ĝi estas la pleja. Certe, nia listo kreskas.

Mi insistas atendi ideojn, kiujn ni povas transkribi en ĉi tiu ejo por la bono de nia listo kaj ties listanoj, kaj ankoraŭ plie: por la bono de la homaro. Intelektuloj, bonvolemluloj, spertuloj pri ekonomio kaj komerco, grandaj kaj ne grandaj komercistoj aŭ simpatiantoj al ĝi, aŭ ordinaraj homoj kiel mi, povas, per ĉi tiu ejo, ne gravas la grado pri rego de nia lingvo, alporti grenojn por nia monda kaŭzo. KREDU je mia granda bonintenco meti en viajn manojn mian modestan kapablon.

Samideane kaj komerce via,

Santiago Alvarez, <http://us.click.yahoo.com/k6cvND/n97DAA/ySSFAA/IYOoIB/TM>


## MONDA UNIVERSITATO

Invitite de Brazilia Esperanto-Ligo, D-ro *Adonis Marcelo Saliba Silva* akceptis la taskon kunordigi laborgrupon por ellabori projekton pri virtuala Esperanta universitato. Laŭ la projekto, la Monda Universitato – jen la nomo de la virtuala lernejo, kiun gastigos la nova paĝo de BEL, disponigos al E-parolantoj kiel eble plej multnombrajn kursojn pri la plej diversaj branĉoj de la homaj konoj. BEL elektas nomojn el la plej elstaraj geesperantistoj de la tuta mondo por kontribui ne nur al la finpretigo de la propra projekto, sed ankaŭ por partopreni en la estonta etato de la institucio. Monda Universitato respondos, per si mem, al unu el la plej gravaj demandoj pri Esperanto, nome, pri ties utileco. Ĉiuj esperantistoj estas invitataj viziti la provizoran paĝon de la Monda Universitato ĉe <http://www.astrale.com/mu>. Al tiuj, kiuj emas fari sugestojn pri la projekto, estas petata kontakti D-ron Saliba per la adreso:

[mondauniversitato@astrale.com](mailto:mondauniversitato@astrale.com), kopie al [bel@esperanto.org.br](mailto:bel@esperanto.org.br)

*Departemento pri Komunikado, Brazilia Esperanto-Ligo*

## BET-38 en Rigo



*Partoprenantoj de BET-38 ĉe koncertejo "Ave Sol" post malfermo. Foto de R.Endriulaitis*

Al laŭvicaj 38aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Latvia ĉefurbo Rigo kolektiĝis 182 samideanoj el 17 landoj: Britio 1, Danio 1, Estonio 10, Francio 3, Finnlando 13, Germanio 7, Irano 1, Katalunio 2, Latvio 41, Litovio 34, Nederlando 1, Norvegio 2, Pollando 57, Rusio 3, Slovakio 1, Svedio 3, Svislando 2.

Antaŭ malfermo okazis ekumena diservo en katolika katedralo de S-ta Jakobo. Por solena malfermo de BET-38 oni kolektiĝis la 8an de julio en koncerthalo "Ave Sol". Post salutparoloj sekvis koncerto: per popolaj muzikiloj ludis kaj kantis ensemblo "Ilga" (gvid. I.Krauze); R.Hansens elprovis nove instalitan orgenon ludante Fantazion de J.S.Bach. En la fino kantis fama vira koruso "Absolventi" (gvid. prof. A.Platers; dum la koncerto lin anstataŭis P.Kvelde). La koruso plenumis klasikaĵojn de mondaj kaj latvaj komponistoj, ankaŭ latvajn popolkantojn. Agrable sonis viraj voĉoj sub volboj de la halo.

Programo de BEToj jam iĝis tradicia: diversnivela E-kursoj, somera universitato, ekskursoj, distraj vesperoj...

Prelegoj de la somera universitato estis diverstemaj. L.Bërce dum 4 prelegoj revuis latvan literaturon; B.Najbaro prelegis pri abeloj, T.Grundström – pri devenintoj el Baltio en Finnlando; P.Ĉeliauskas rakontis pri historio de Litova Stelo kaj proponis dumvivan abonon de la revuo al tiu, kiu sukcesos trovi la unuan n-ron, eldonitan en 1914. Dua lia prelego estis pri uzado de prepozicioj "de" kaj "da". E.Vāvere parolis pri neceso zorgi pri

sia sano. K.Ripa konigis aŭskultantojn kun malfacile komprenebla teorio de fizika vakuo kaj torsionaj kampoj. A.Zigmunde koncize rakontis historion de E-movado en Latvio, ankaŭ pri naciecoj en Latvio. A.Bušs prelegis pri mondkoncepto de Jan Amos Komensky interrilate kun la nova jarmilo.

La partoprenintoj havis eblecon ekskursi per piede tra malnova urboparto de Rigo kaj ŝip-promenante laŭ rivero Daŭgavo. Ĵaŭde estis organizita busa ekskurso al Nacia Parko en Tērvete, al akvofontoj de Ŝevele, kie oni povis gustumi bonegan akvon. La ekskurso finiĝis en arbaro Pokaiņi, kiu lastatempe famiĝas per enigma tereno kaj (onidire) forta energia radiado, do iuj parolas eĉ pri kontaktoj kun kosmo. Interese, ke tiu loko troviĝas sur la sama meridiano, kiel ankaŭ famaj temploj de antikva Grekio.

Estis organizitaj ekspozicetoj de pentraĵoj de A.Turka, kiu ŝatas desegni ĉevalojn, kaj de 15-jara A.Mediņa, ankaŭ de manlaboroj. N.Caragea gvidis vortludojn, kaj N. Pietuchowska – kvizon kun premioj pri historio de Esperanto.

Aperis 6 numeroj de informilo "Riga BET-ano".

*Albinas PEČELIS*



*Grupeto da litovoj dum ekskurso en parko Tērvete, ĉe Reĝo de la arbaro. Foto de A.Vorobjova*

## FERIOJ EN BALTIAJ LANDOJ

Ni duope planis ĉi-jare ferii en Baltio serĉante malvarmeton kaj elteneblajn prezojn. Lastmomente ni eksciis pri du Esperanto-aranĝoj en Latvio ĝuste dum niaj celtagoj, do ni tuj aliĝis rete kaj ekvojaĝis. Ambaŭ aranĝoj havis sian bazon en Rigo: la 12a Internacia Esperanto-Kongreso montriĝis aranĝo de Monda Turismo, pola turisma agentejo el Bydgoszcz, dume la 38aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estas konata tradicia Esperanto-kongreso. Ili ambaŭ daŭris po unu semajno.



*Ŝip-promenado laŭ rivero Daŭgavo spektante panoramon de Rigo. Foto de R.Endriulaitis*

IEK logis du tute malsamajn grupojn de homoj: tri-kvar busoj da polaj turistoj kaj dudeko da esperantistoj; entute laŭdire ĉ. 200 personoj. La kongresa temo estis “Ekologio kaj multnacia kulturo en Latvio”. Ekologio fariĝis taŭga alibio por ĝui la latvan naturon, kiu ravegas okulojn de mediteraneulo: ni konatiĝis kun du parkoj de la verda Rigo kaj dum tri tuttagaj ekskursoj kun diversaj naturaj vidindaĵoj de la lando. La duan parton de kongresa temo ni apenaŭ rimarkis, se ne temas pri ĉiutagaj koncertoj en diversaj lokoj de kvar kunveturantaj polaj ensembloj. Estis agrable ilin aŭdi kaj vidi, sed aŭskulti kelkfoje la saman repertuaron eltenas malmultaj grandanimuloj. En la koncertoj partoprenis ankaŭ latvaj grupoj (ĉiam malsamaj kaj tre plaĉaj), sed indiĝenajn spektantojn ni apenaŭ vidis.

Dekomence la organizado bedaŭrinde ne estis kontentiga. Feliĉe la aferoj pliboniĝis dum la lasta duono de la aranĝo. Laŭ nia kompreno la problemojn naskis troa superŝarĝo de la ĉefa respondeculo kaj nesufiĉa kunordigado inter latvaj kaj polaj gvidantoj.

Senpere tuj post la unua aranĝo sekvis Esperanto-kongreso laŭ klasika formato: en kongresejo, kun prelegoj, kursoj, ekskursoj kaj distraĵoj. En ĝi partoprenis ĉ. 180 homoj, ĉefe el Baltiaj landoj, Skandinavio, Germanio kaj buso da polaj komencantoj. Ĉi-foje, jes, eblis babilu kun latvoj kaj pli profunde konatiĝi kun ilia ŝanĝiĝanta lando. Ni tre ĝuis ankaŭ kurson pri latva lingvo kaj kvarpartan prelegon pri latva literaturo. Ni principe aparte interesiĝis pri la t.n. “somera universitato”, sed ties nivelo estis malalta. Estas konate, ke post diktatora reĝimo multaj malpermesitaĵoj ekŝajnas mirindaj, kaj tio vaste malfermas pordojn al la plej malverŝajnaj ezoteriaĵoj. Anstataŭ “universitato” oni prefere nomu ĝin “speaker’s corner” laŭ Londona parkangulo, kie ĉiu povas eldiri sian opinion.

Krom tio la kongreso pruviĝis tute trafa por konatiĝi kun Latvio: ĝi tion sukcesis multe pli kontentige kaj profunde ol klasika turismado anglalingva, kiun ni dekomence antaŭvidis. Aldone, ĉar la kongreso okazis meze de granda kaj alloga urbo, tio faciligis deturniĝon de ne ŝatataj programeroj por pli profunde ĝui la urbon, ties vidindaĵojn kaj muzeojn – bonege por turistoj kiel ni, sed eble ne tiel bone por homoj serĉantaj Esperantan etoson. Cetere, vizito al bonege aranĝita pedagogia muzeo pri okupacio estas nemalhavebla por eksterlandano. Ni tre miras, ke ĝi ŝajne riskas malaperi.

Bedaŭrinde en tiu semajno la temperaturo superis 30 gradojn, ĉesis beninda regula pluveto kaj ni rostiĝis en nia saŭco laŭ kutima somera kuir-recepto. Pluraj, tre kompreneble, forkuris al la apuda maro.

Post du semajnoj pasigitaj en Latvio ni vojis suden al Litovio. Oni tre gastame akceptis nin en Esperanto-domo en Kaŭno. Tie ni restis dum tri tagoj, sed tiu tempo evidentiĝis apenaŭ sufiĉa por bone konatiĝi kun tiu bela kaj agrabla urbo (ni ne povis viziti ĉirkaŭaĵojn nek tre laŭdatan Vilnon), sed ni havis la okazon praktike uzi ĵus eldonitan tre belan kaj kompletan broŝuron “Kaunas 2002”, tutkoloran, grandformatan kaj 28-paĝan por suprajne malkovri miriadon da oldaj domoj, plejadon da imponaj preĝejoj kaj svarmon da atentokaptaj muzeoj, el kiuj la artgalerio de Mykolas Žilinskas nin aparte surprizis kaj impresis.

Fine, substreke menciindas libroservoj en Rigo kaj Kaŭno, de kiuj ni akiris plurajn kilogramojn por nia revenvojaĝo. Necesis aĉeti novan sakon por ĉion kunporti.

Post ĉio, ni restas plene kontentaj pri nia vojaĝo kaj kun grandaj deziroj reviziti Baltion.

*Hektor Alos i Font (Katalunio)*

## ANTANAS STATKEVIČIUS

(1915.05.15 – 2002.05.29)



En majo forpasis unu el plej maljunaj esperantistoj de Kaunas – samideano Antanas STATKEVIČIUS. Naskiĝis li antaŭ 87 jaroj en distrikto Raseiniai (nun de Jurbarkas). Kun la internacia lingvo lin, 15-jaran knabon, konatigis kuzo Stasys Galbuogis. La juna Antanas ekkorespondis kun E. Medonis, ricevis de li Esperantajn eldonaĵojn. Pli poste – familiaj zorgoj, militservo, okupacio, malpermeso de Esperanto.

En 1944 Antanas ekloĝis en Kaunas. Komence li laboris en navigacia estraro, poste en Politeknika Instituto. Kiam renaskiĝis E-movado, en 1958 li aliĝis al Esperanto-rondeto kaj restis fidela ĝia membro, aktive partoprenis en renkontiĝoj de esperantistoj, estis fotisto-amatoro. Dum sia vivo li kolektis Esperantan bibliotekon, kiun donacis al Kaŭna Esperanto-domo. Samideanoj memoros lin kiel modestan, diligentan homon, kun kiu estis facile interkomunikiĝi.

*Grupo da amikoj*



## En la mondo Esperanta

*Litova Esperanto-Asocio gratulas Antanas VISOCKAS, gvidanton de turisma agentejo "Bonvoje" okaze de lia 50-jara jubileo kaj elkore deziras al li feliĉon en la vivo, sukceson en laboro organizante multajn impresajn ekskursojn por esperantistoj.*

### La nova PIV

Finfine la nova PIV aperis kaj estas akirebla en la Libroservo de UEA.

La nova eldono, kiun ĉefredaktist Michel Duc-Goninaz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpigita en la teksto mem. Formato 150 x 255 mm, 1265 paĝoj. La Libroservo de UEA vendas ĝin kontraŭ 78,00 € plus kutimaj aldonajoj – 10 % sendokostoj kaj 6 % imposto (nur por landoj de EU). Mendiante 3 ekz. samtempe (al la sama adreso) oni ricevas sesonan rabaton (16,66 %).

Por litovoj la vortaro kostos preskaŭ 300 lidojn. Se la vortaro estos akirebla ĉe LitEA, ni informos pri tio.

### Aroma Jalto – 2002

Tradicia lingva E-festivalo en Jalto (Krimeo, Ukrainio) ĉi-jare kolektis pli ol 60 samideanojn el 6 landoj kaj 20 loĝlokoj.

Ekde mateno la verda popolo kutime plialtigadis lingvonivelon. Funkciis tri lingvogrupoj, la plej multnombra estis la perfektiga kurso, gvidata de Olena Pošivana.

Post la kursoj pri plua klerigo de partoprenantoj okupiĝis Anatolo Gonĉarov kaj Tatjana Aŭderskaja. Ili prelegis pri interesaj kaj utilaj eroj de nia vivo.

Distra programo estis varia: montogrimpado, ŝakturniro, koncertoj, ŝipopromeno en la maro, vizito de parkoj kaj plaĝoj.

### 13aj Esperantaj Tagoj en Pollando

en Staszów okazis 16-19an de majo 2002. Organizantoj estis Andrzej Sochacki, ĉefamanto de Esperanto en la regiono, kaj sperta esperantisto Antoni Drozd.

En la aranĝo partoprenis ĉ. 40 personoj, venintaj el diversaj urboj de Pollando. Inter ili estis ankaŭ eminenta esperantisto el Kievo Mihail Lineckij.



Porokaza poŝtkarto kun speciala stampo

Krom prelegoj kaj amuza programo, ĉi-jare estis eldonita porokaza poŝtkarto kaj uzita porokaza dukolora (verda kaj viola) stampo, do ili fariĝis valoraj kaj raraj filatelaĵoj por kolektantoj. Estis eldonita ankaŭ insigno kaj gvidlibro (pollingva) pri Staszów kaj ĉirkaŭaĵoj.

### 15a IKF

Esperanto-klubo en Ústí nad Labem (Ĉeĥio) aranĝas la 15an Internacian Kulturetan Festivalon de la 4a ĝis la 6a de ok-

oktobro 2002.

La festivalo estos dediĉita al rememoro de ĉefaj Esperantaj verkistoj Jiří Kofínek kaj Tomáš Pumpr. La programo estas dis- tra: vendrede – interkona vespero, sabate – prelegoj, koncerto de oper- kaj operet- arioj, dimanĉe – ekskurso al kastelo Velké Březno.

La aranĝo estas plej malmultekosta en Eŭropo!

Pliaj informoj laŭ adreso:

Miroslav Smyčka, Kojetická str. 90,  
CZ-400 03 ÚSTÍ nad Labem, (Ĉeĥio);

e-poŝto: [j.sema@tiscali.cz](mailto:j.sema@tiscali.cz)

### **Aŭtunaj Esperanto-Tagoj en Finnlando**

Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando (21.-22.09.2002) invitas al loko, kiun ankaŭ en Finnlando malmultaj konus, se ĝi ne estus la naskiĝloko de la populara verkisto Kalle Päätalo (1919-2000), kiu priskribas ĝin en siaj romanoj. Temas pri Taivalkoski en Norda Finnlando kun ĉ. 5000 loĝantoj.

Finnaj esperantistoj konas Taivalkoski pro la agado de s-ino Aini Vääräniemi, kiu gvidas grupon en sia vilaĝo Metsäkylä. Tie ŝi inaŭguris Arbaron de Zamenhof, kie vizitantoj el pluraj landoj nomis arbojn laŭ siaj landoj. Laŭ ŝia iniciato la fabel- konkurso de Päätalo-instituto havas ekde 2000 Esperanto-branĉon sub aŭspicioj de UEA. Pro tiuj atingoj EAF premiis ŝin per la titolo Aganto de la Jaro 2001.

La temo de la Tagoj estos "Pensu globe - agu loke!" por memori pri la grava rolo de loka agado por atingo de tutglobaj celoj.

La Aŭtunaj Tagoj estos "moviĝanta" evento. La bazo estos Hotelo Taivalvaara, kie troviĝas ankaŭ la Päätalo-instituto, kiun gvidas Osmo Buller. La unua tago tamen

ĉefe okazos aliloke pro multhora ekskurso, i.a. al la infanaĝa hejmo de Kalle Päätalo. Oni finos la tagon en Metsäkylä, kie troviĝas – krom Arbaro de Zamenhof – la plej norda Esperantlingva vilaĝa vendejo kun la kafejo Arbar-Bar.

Dum la dua tago la estraro de EAF instigos la partoprenantojn diskuti pri loka Esperanto-agado. La programo finiĝos en vendejo-kafejo Jalava, fondita fine de la 19-a jarcento kaj daŭre funkcia en sia originala stato kiel vivanta muzeo.

Detala programo aperos en la retejo [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi).

Partoprenontoj el eksterlando ne pagos aliĝkotizon. Grupa trajnvojaĝo de suda Finnlando estas organizata. Eblos aliĝi al ĝi en Helsinko, Turkuo aŭ Tampere. La trajno atingos Oulu, de kie oni pluveturos buse al Taivalkoski.

Respondeculo pri la trajnvojaĝo: Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A, 20140 Turku; tel. +358-2-2305319 aŭ +358-50-5494709; <[sekretario@esperanto.fi](mailto:sekretario@esperanto.fi)>.

Pri loĝado k.a. detaloj informas la loka kontaktpersono: Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala; tel. +358-40-5187242;

<[aini.vaaraniemi@pp.inet.fi](mailto:aini.vaaraniemi@pp.inet.fi)>.

### **Eŭropaj verduloj proponas Esperanton**

La 17an-19an de majo 2002 en Berlino okazis 3a Kongreso de Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj, dum kiu estis akceptita rezolucio "Endanĝerigitaj lingvoj". En la rezolucio oni mencias, ke preskaŭ al 60 % da Eŭropaj lingvoj minacas danĝero de malapero, ke perdi lingvon kaj ĝian kulturan kuntekston similas bruligi unikan faklibron pri la natura mondo. La anoncita malapero de 90 % da lingva heredaĵo de la

homaro estus ne nur kultura, sed ankaŭ ekologia katastrofo, kaj tial plene reprezentas ekologian krizon.

La Kongreso invitas Konsilion de Eŭropo, Eŭropan Komisionon kaj Eŭropajn registarojn (membrojn kaj ne membrojn de EU) kunvoki unuan interregistaran konferencon pri stato de lingva ekologia sistemo en Eŭropo. Samtempe oni instigas verdajn partiojn, iliajn deputitojn, ankaŭ verdajn ministrojn disvastigi al sialanda Ministro de Eduko enhavon de la itala cirkulero kaj subteni Eŭropan eksperimentadon de Paderborna metodo pri instruado de fremdaj lingvoj (la metodo pruvas propedeŭtikan valoron de Esperanto).

### Dzukoj, atenton!

Estas kompilata vortareto de dzukaj vortoj kaj ni petas vian helpon. Se vi scias interesajn vortojn en dzuka dialekto, bonvolu sendi al ni, indikante ankaŭ signifon de la vortoj en litova lingvo. Nia adreso:

Gediminas Degėsys  
Rugiu 19 – 24  
LT-2021 VILNIUS.

### Deziras korespondi

15-jara knabo pri rok-muziko, monda historio kaj aliaj temoj. Adreso:

Mindaugas Žuromskas  
Pulko 92 – 17  
LT-4580 ALYTUS, Litovio.



*Sur la foto – grupo da junaj esperantistoj de la 5a mezlemejo el urbo Marijampolė kun gvindantino D. Vidrinskienė. La aktiveco de la grupo menciindas ankaŭ pro tio, ke ĝi en 2002 eldonis 3 numerojn de loka esperantlingva informilo "Verda Mondo", multobligita per printatoro. La gazeteto publikigas verketojn de grupanoj, informojn pri ilia vivo, ekskursoj, amikoj... Sekvinda ekzemplo!*

## Ŝanĝo de telefonaj kodoj kaj numeroj en Litovio

En Litovio ŝanĝiĝis telefonaj kodoj kaj numeroj. Por tiuj, kiuj kontaktas kun Litovio telefone, estos utilaj la subaj informoj.

Kodo de Litovio (telefonante el eksterlando) restis la sama: **370**. Poste sekvas kodo de urbo aŭ distrikto, kaj tiu kodo estas 1-3-cifera, trovebla en la suba tabelo. (En krampoj estas indikita ankaŭ malnova poreksterlanda ducifera kodo, kiu ne plu validas.)

Akmenė	425	(95)
Alytus	315	(35)
Anyškščiai	381	(51)
Birštonas	319	(10)
Biržai	450	(20)
Druskininkai	313	(33)
Elektrėnai	528	(38)
Ignalina	386	(29)
Jonava	349	(19)
Joniškis	426	(96)
Jurbarkas	447	(48)
Kaišiadorys	346	(56)
<b>KAUNAS</b>	<b>37</b>	(7)
Kedainiai	347	(57)
Kelmė	427	(97)
<b>KLAIPĖDA</b>	<b>46</b>	(6)
Kretinga	445	(58)
Kupiškis	459	(31)
Lazdijai	318	(68)
Marijampolė	343	(43)
Mažeikiai	443	(93)
Molėtai	383	(30)
Neringa	469	(59)
Pakruojis	421	(91)
Palanga	460	(36)
<b>PANEVĖŽYS</b>	<b>45</b>	(5)
Pasvalys	451	(71)
Plungė	448	(18)
Prienai	319	(49)
Radviliškis	422	(92)
Raseiniai	428	(28)
Rokiškis	458	(78)
Skuodas	440	(16)
Šakiai	345	(47)
Šalčininkai	380	(50)
<b>ŠIAULIAI</b>	<b>41</b>	(1)
Šilalė	449	(69)
Šilutė	441	(41)

Širvintos	382	(32)
Švenčionys	387	(17)
Tauragė	446	(46)
Telšiai	444	(94)
Trakai	528	(38)
Ukmergė	340	(11)
Utena	389	(39)
Varėna	310	(60)
Vilkaviškis	342	(42)
<b>VILNIUS</b>	<b>5</b>	(2)
Visaginas	386	(66)
Zarasai	385	(70)

Do, la nova kodo de Vilnius por eksterlandanoj estas 370-5, tiu de Kaunas – 370-37, de Klaipėda – 370-46 k.t.p.

Numeroj de telefonaj abonantoj ŝanĝiĝis *nur en Vilnius*, kie ili fariĝis 7-ciferaj, kaj la ŝanĝo koncernas la unuajn ciferojn:

2X XX XX ⇒ 21X XX XX

3X XX XX ⇒ 23X XX XX

4X XX XX ⇒ 24X XX XX

5X XX XX ⇒ 25X XX XX

6X XX XX ⇒ 26X XX XX

7X XX XX ⇒ 27X XX XX

Ekzemple, telefono de la Filio de LitEA en Vilnius estis: (370-2) 39 10 78; nun ĝi estas (370-5) 239 10 78.

Telefonante en Litovio al alia urbo aŭ distrikto anstataŭ 370 turnu 8, poste sekvas kodo de la urbo aŭ distrikto. Ekzemple, numero de Litova EA en Kaunas estas (8-37) 20 85 03.

Ĉio tio koncernas nur reton de fiksita telefona ligo. Multaj homoj jam uzas mobilajn telefonojn, do ili mem devas informi pri siaj numeroj.

*Laŭ informoj de "Lietuvos telekomas"*



## FILOZOFIAJ ANEKDOTOJ



### Kaŭzo kaj konsekvenco

Iam en Kalifornia arbaro de sur arbo falis folio. Malproksime rampis dika verda raŭpo, kaj por eviti kunpuŝiĝon kun la folio, ĝi devis ŝanĝi direkton kaj rampi super trunkon de falinta arbo. Tiumomente preteriranta homo ekŝidis sur la trunkon por ripozeti kaj disprenis la raŭpon. La viro eksaltis kvazaŭ pikita kaj forgratis la raŭpon de la pantalonon.

Hejme la viro ŝanĝis vestojn kaj la pantalonon portis al purigejo. Tie li renkontis junan virinon. Ili interparolis, poste kune iris al apuda kafejo. Baldaŭ ili enamiĝis kaj post iom da tempo geedziĝis. Al ili naskiĝis knabeto, kiu estis tre kapabla kaj bonege lernis. Li iĝis advokato kaj pli poste – fama politikisto.

Pro tio, ke iun tagon en Kalifornio de sur arbo falis folio, Richard Nixon iĝis 37a prezidento de Usono. Kia bagatela kaŭzo kaj, Dio mia, kia grandega konsekvenco!

### Infano de malfeliĉo

Vojaĝontoj eniras en aviadilon. Inter ili videblas junulo kun bluaĵo ĉe okulo kaj vestita nur per kalsoneto. Unu pasaĝero diras al li:

– Aŭskultu, ĉu vi ne povis vesti vin pli bonmore kaj dece?

– Komprenu, mi estas infano de malfeliĉo. Ĵus mi eliris el hejmo, min atakis tri banditoj, prirabis, forprenis vestojn, nur aviableton restigis...

Tiuj du homoj hazarde eksidas apude. La malfeliĉulo daŭrigas:

– Vi ekvidos, ni ne atingos vojaĝ-celon, ja mi estas infano de malfeliĉo.

Kaj vere, post iom da tempo en la salonon eniras stevardino kaj diras:

– Bonvolu ne paniki... Nia aviadilo falas en oceanon. Ni tuj disdonos al vi sav-veŝtojn kaj fajfilojn por fortimigi ŝarkojn.

– Nu, kion mi diris? Kaj nun aŭ mia veŝto estos difektita aŭ ŝarkoj estos surdaj...

### Saĝulo

En urbon venis saĝulo, kunvokis homojn kaj demandis ilin:

– Ĉu vi scias, kion mi volas diri?

– Ne, ni ne scias!

– Se vi ne scias, do vi ne bezonas scii.

Duan fojon al la sama demando la kunvenintoj decidis respondi alie:

– Jes, ni scias!

– Se vi scias, kial do vi venis ĉi tien?

Trian fojon unuj respondis “ni scias”, aliaj – “ni ne scias”. La saĝulo tiam diris:

– Tiuj, kiuj scias, diru al tiuj, kiuj ne scias, kaj ĉiuj ekscios.

### Pri vivodaŭro

Alaho disdonadis vivodaŭron al ĉiuj kreaĵoj. Ĉiuj animaloj ricevis po 50 jarojn, sed kiam malfruiĝinte venis homo, ĉe Alaho restis nur 25 jaroj. Homo estis ege malkontenta.

– Iru kaj demandu, eble al iu animalo la vivo estos tro longa, – konsilis Alaho.

La homo renkontis ĉevalon kaj petas, ke tiu transdonu al li parton da sia vivo. La ĉevalo konsentis kaj transdonis 25 jarojn. Poste li renkontis hundon, simion, kaj ankaŭ ili donacis al la homo po 25 jarojn.

La homo revenis al Alaho. Tiu diras:

– Se vi tiel decidis, vivu, kiom vi deziras.

La unuajn 25 jarojn vi vivos kiel homo, la duajn – laboros kiel ĉevalo, la triajn – bojos kiel hundo. La lastajn 25 jarojn ĉiuj ridos pri vi samkiel pri simio.

### Ĉiu volas vivi...

Ekmalŝanis iu judo, iris al kuracisto, poste en apoteko aĉetis kuracilon. Veninte hejmen li forĵetis la kuracilon en rubujon.

– Kial vi tion faris? – ekmiris hejmanoj.

– Nu, mi iris al kuracisto, pagis al li, ĉar li ja devas vivteni sin. Mi pagis al apotekisto – ankaŭ tiu volas vivi. Kaj mi forĵetis la kuracilon en rubujon, ĉar ankaŭ mi volas vivi...

## VORTENIGMO

G	R	A	F	O	—		G			=	
M	U	M	I	O	—			M		=	
V	E	N	D	O	—	D				=	
D	R	A	M	O	—	M				=	
A	B	O	N	A	—				O	=	
T	E	M	P	O	—			T		=	
F	I	E	R	A	—				I	=	
N	I	G	R	E	—			G		=	
S	T	E	L	O	—		O			=	
D	U	O	N	O	—				U	=	

El la kvinlitera vorto forigu unu literon. Restajn literojn rearanĝu tiel, ke estu ricevita nova sencohava vorto, ekzemple:

F	E	S	T	O	—	O	F	T	E	=	S
---	---	---	---	---	---	---	---	---	---	---	---

Por plifaciligo de la tasko unu litero de la enskribenda vorto jam estas donita.  
La forigitaj literoj konsistigos vorton tre gravan por esperantistoj.

## VORTLUDOJ

### 1

En donitajn vortojn (en ajnan lokon – komence, meze aŭ fine de vorto) enmetu numeralojn **unu, du, tri, kvar, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent** kaj ricevu novajn sencohavajn vortojn, ekzemple: AIO – A4IO – AKVARIO. (La vorludo farita laŭ ekzemploj de lernejana gazeto “Verda Mondo”).

ANO, ANTENO, FERRO, INGO, IO, KLINO, KONKO, MONO, PANO, PARO, PASO, PROVO, RALO, RO, ROKO, SIDO, SO, TALO, TEMBRO, TERCIO, TIKO, TIMO, TRAKO, ULO, ZO.

### 2

Sammaniere enmetu ne numeralojn, sed personajn pronomojn: **mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, ili**.

ARKO, BULO, FORKO, FORSTO, GRENO, INVADO, KETO, KLIKO, MANO, MONO, PANO, PAPO, RANO, TIO, VAZO.

# PERANTOJ DE LITOVA STELO

**AŬSTRALIO:** Želimir Pehar, 14 Boronia Ave., DANDENONG North 3175 Vic.

**BELORUSIO:** Eūgenija Pečkova, Nadejdinskaja 11-2-23, BY-220006 MINSK.

**BRITIO:** Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby GREAT GRIMSBY,

S.Humberside DN36 5RT

**ĈEĤIO:** Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 STRÁŽNICE;

tel.420/631/ 332 278; telefakso 332507; retadreso [vlada\\_hasala@iol.cz](mailto:vlada_hasala@iol.cz); abonkoto 407 CZK.

**DANIO:** Libroservo de DEA, c/o Frederik Erikssen, Finsensgade 10, DK-4800 NYKØBING

**ESTONIO:** Virve Ernits, Vallimaa 17 - 8, EE-93812 KURESAARE.

**FRANCIO:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS.

**GERMANIO:** Esperanto-Centro e.V., Rheinstrasse 9, DE-12159 BERLIN

**HISPANIO:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200 SABADELL

**IRANO:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

**ITALIO:** Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, IT-34129 TRIESTE; tel/fax +39/40/767875

**KANADO:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, SIDNEY, BC, Kanado V8L 3S6.

**LATVIO:** Margarita Želve, Rūpniecības 35 - 13, RĪGA LV-1045.

**MAKEDONIO:** Esperanto-Societo "La Progreso", p.f. 197, MK-7500 PRILEP.

**NEDERLANDO:** Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM.

**RUSIO:** 1) Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 KALININGRAD

2) Mihail Ĉertilov, p.f. 21, RU-143000 MOSKVA-ODINCOVO - 6

**SVEDIO:** Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, SE-242 94 HÖRBY.

**USONO:** E.L.N.A., Central Office, P.O.Box 1129, EL CERRITO, California 94530

**PERANTOJ EN ALIAJ LANDOJ ESTAS SERĈATAJ!**

Niaj e-poŝtaj adresoj – de Litova Stelo: [litovastelo@takas.lt](mailto:litovastelo@takas.lt)

De Litova Esperanto-Asocio: [litova.ea@mail.it](mailto:litova.ea@mail.it)

## ATENTU PRI NOVAJ ABONPREZOJ POR LA JARO 2003

**Por Litovio:** jarabono 20 Lt; unuopa n-ro 4 Lt; malnova jarkolekto 10 Lt.

**Por landoj de eksa Sovetio:** jarabono 7 USD; unuopa n-ro 1,50 USD; malnova jarkolekto 3 USD.

**Por estintaj popoldemokratiaj landoj:** jarabono 10 EUR / 10 USD; unuopa n-ro 2 EUR / 2 USD; malnova jarkolekto 5 EUR / 5 USD.

**Por aliaj landoj:** jarabono 14 EUR / 14 USD; aeroŝta aldono: 6 EUR / 6 USD; unuopa n-ro 3 EUR / 3 USD; malnova jarkolekto 7 EUR / 7 USD.

**Krom eŭroj, ni indikas abonprezojn ankaŭ en USD (lastatempe kurzo de eŭro kaj dolaro preskaŭ egalas). Abonado ne havas limdaton – ĉiu aboninto ricevos ses numerojn de la jaro 2003. Dezirindas la abonperiodo de kalendara jaro (januaro-decembro).**

---

Lietuvos žvaigždė ISSN 1648-4185

Lietuvos esperantininkų sąjungos žurnalas 2002 m. nr. 4. Baigta redaguoti 2002.08.12.

SL Nr 797. 2 sp. lankai. Ofsetinė spauda. Tiražas 600. Užs. nr. 1186

Spausdino spaustuvė "Aušra", Vytauto pr. 23, Kaunas.

---



Litovaj naciaj vestoj en postmarkoj de la lando